


277
1.2.1988



AL LA NOVA ETAPO

KONGRESA KURIERO DE LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN PEKINO 1986

Sub la aŭspicio de El Popola Ĉinio

Unua numero 26-07-1986

“Al la Nova Etapo”

estis la titolo de ĉina esperanta informilo redaktita de s-ro Chen Yuan, nuna vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, en la jaroj 1937-1938 por la celo fortigi la solidarecon inter la popoloj kontraŭ faŝismo. Post duonjarcento ni prenis ĝin kiel la titolon de nia nuna kongresa kuriero, kiu simbolas ke la internacia Esperantomovado eniras en la novan etapon, la etapon per Esperanto por paco, progreso, interkompreniĝo kaj evoluado.

La red.

La Kongresa Kuriero aperos en jenaj tagoj:

- La 26an de julio, sabate
- La 27an de julio, dimanĉe
- La 28an de julio, lunde
- La 29an de julio, marde
- La 31an de julio, ĵaŭde
- La 1-an de aŭgusto, vendrede

Ĉiuj kontribuoj estos bonvenaj. Bonvolu sendi ilin al la redakcejo en la salono Tikos (102).

La Libroservo

La Libroservo de la UK funkcias en la salono Lusin (402) en la Pekina Scienca Halo, de 8:30 ĝis 17:30 ĉiutage. Ĉe ĝi eksponiĝas kaj ven-

diĝas libroj, poŝtkartoj kaj ĉinaj metiartaĵoj. La Internacia Librokomerca Kompanio preparis ĉinstilajn memorarojn kiel donacojn al tiuj, kiuj faros aĉeton ĉe la servo.

P.S. Perantoj de El Popola Ĉinio bonvolu kontaktiĝi kun la Esperanta Sekcio de la Internacia Librokomerca Kompanio ĉe la Libroservo.

La Fotoservo

Sin trovas en la salono Qiu Ji (n-ro 104) en la Pekina Scienca Halo. Ĝi liveras al vi fotojn pri diversaj aktivadoj de la Kongreso kaj servas al vi per fotado, filmrivelado kaj kopi-farado. La prezoj estas favoraj. La servotempo estas 08:00-12:00 kaj 13:00-18:00.

Venos la desegnistino de la filatela tutaĵo

Invitite de LKK, s-ino Ren Yu, la desegnistino de la filatela tutaĵo de la 71-a UK venos en la 26a de julio

por subskribi al tutaĵo-aĉetintoj. Ne perdu la bonŝancon, ĉar ŝi restos ĉe ni nur unu tagon. Tutaĵovendejo estos en la subtera ripozejo (salono Damjanov).

Poŝtaj Kostoj por Internacia Sendajo (en Yuan-o)

klasifiko	unuoj de kalkulo	kostoj
Simpla letero	malpli ol 20 gr.	1.10
Aerpoŝta letero	malpli ol 20 gr.	0.80
Aerpoŝta letero	20-50 gr.	1.80
Aerpoŝta unuopa poŝtkarto		0.90
Registra afranko	po peco	0.50

Se vi uzos la filatelan tutaĵon de la 71-a UK por sendi internacian leteron, do bonvolu aldone afranki je 1 Yuan-o.

Jam 2 200 aliĝintoj!

Por informi la gazetaron pri la baldaŭ okazonta kongreso, antaŭtagmeze de la 25-a, estraranoj de UEA donis akcepton al ĵurnalistoj en Pekino. 44 novaĝ-agentaĵoj kaj redakcioj de gazetoj kaj ĵurnaloj sendis siajn raportistojn al la akcepto. Interalie ĉeestis ankaŭ ĵurnalistoj japana, usona kaj hungara.

Simo Milojević, ĝenerala direktoro de UEA, deklaris ĉe la akcepto, ke la nombro de aliĝintoj al la Pekina Kongreso jam atingis 2 200, kaj novaj aliĝintoj daŭre venas.

cotaj). Ĉar oni povas akcepti nur limigitan nombron da ekzamenatoj, **ambaŭ ekzamenoj estas nur por aziaj kongresanoj.** La ekzamenkoto estas 2 ĵurnoj kaj oni devas pagi ĝin samtempe kun la aliĝo. Ĉinaj kongresanoj, kiuj volas partopreni, bv. aliĝi pere de s-ro Li Shijun, aliaj ĉe la informejo.

Ni atentigas, ke en ambaŭ ekzamenoj estos du partoj: skriba kaj buŝa. Diplomo pri sukcesa trapaso en la ekzameno estos sendita poŝte post la UK.

Internaciaj ekzamenoj

UEA sukcesis lastmomente aranĝi, ke la internaciaj ekzamenoj pri Esperanto okazu en la 71-a UK. Estos du ekzamenoj: elementa kaj meza, kaj ili okazos en ĵaŭdo, la 31an de julio (horo kaj loko anon-

Programer-ŝanĝoj

Akcepto de Radio Pekino okazos marde en 15:00-17:30 en Radiodomo.

Nacia vespero okazos sabate 19:30-21:30 en la Ĉina Teatrejo.

Por via SANO

aliĝu al la

KURSO de

TAJĜIĈJUAN

Ĉina tradicia luktarto
saniga gimnastiko

Tempo: 27, jul.—2, aŭg. (escepte de 30, jul.),
ĉiumatene 7:00—7:30

Loko: la placo antaŭ la teatro en la Amikeca Hotelo
(la kurso estas senpaga)

Adresaro

- 2116 moua-v Eun S-ro Mouam T.I.P.O. Box 5075 100-31 Tôkyô Japanujo
- 2117 wtak-q Watanabe S-ro Takashi Jutaka-maĉi Sinagaŭa-ku 2-11-17 142 Tôkyô Japanujo
- 2118 jmbf-g Bernabéu Franco S-ro José M. Gen. Primo de Rivera 6 03002 Callosa de Segura (Alicante) Hispanujo
- 2119 buma-f Burza Magda Hungarujo

Redaktis Osmo Buller, Leif Gunnar

Nordenstorm, Liu Ling kaj Tan Xiuzhu

EPC-INFORMILO

UNUA NUMERO

Ĉina Esperanto-Ligo

La Ĉina Esperanto-Ligo fondiĝis en Pekino la 11-an de marto 1951.

Gia celo estas disvastigi kaj apliki Esperanton, fari internacian interŝanĝon de scienco, teknologio kaj kulturo, akceli la amikecon kaj unuiĝon inter diversaj popoloj kaj defendi la mondpacon.

Ĝi konsistas el konsilantaro kaj konstanta konsilantaro. Hujuz funkcii kiel ĝia prezidanto ĝis sia morto. Bakin, Ĵelezo (ĝia aganta prezidanto) kaj Ĉen Ĵuan estas ĝiaj vicprezidantoj kaj Gang Ĉjiĉeng ĝia ĝenerala sekretario.

La ligo eldonas la gazeton "El Po-

pola Ĉinio" por la tutmonda esperantistaro kaj ankaŭ la monatan revuon "La Mondo" ekskluzive por la ĉinaj esperantistoj.

Laŭ nekompleta statistiko, en la lastaj jaroj ĉ. 200 000 ĉinoj lernis nian lingvon. Ĝis majo 1986, jam 27 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de Ĉinio fondis sian Esperantan organizon.

Krome la ligo ankaŭ akceptis gesamideanojn el aliaj landoj kaj 11-foje sendis sian delegacion al UK.

Aŭguste de 1980 la Ĉina Esperanto-Ligo aliĝis al UEA kaj fariĝis ĝia landa asocio.

Naciaj dancoj kaj kompozicioj

En la nacia vespero estos dancoj kaj kompozicioj. La danco "Pavo" estas unu el la eminentaj programeroj tie prezentataj. La danco furoras en la regiono de taj-oj en Junnan-provinco. La taj-oj rigardas pavojn bonaŭguraj kaj per la danco montras sian belan idealon. La dancantoj en pav-forma kostumo, akompanate de tamtamoj kaj gongoj, flirtas imitante pavon kaj kreas tre graciajn dancmovojn.

La popolaj dancoj de la ĉina nacio

estas longhistoriaj kaj diversformaj, plejparte kun kantado, ekz. *jangge* kaj *jaŭgu* de la hanoj, *andaj* de la mongoloj, *ŝjanzi*, *ĝuoĝŭang* de la tibetanoj kaj *sajnajmu* de la uĝuroj.

La nacia muziko de Ĉinio travivis jarmilojn da evoluo kaj formis sian originalan stilon. La orkestra kompozicio "Printempa Rivero en Luna Nokto" donos al vi imagon, ke fiŝboatoj revenas ĉe la sunsubiro.

Pekina opero

En la nacia vespero vin amuzos la fama pekina opero "Sanĉakoŭ" kaj ĝuigos al vi la belan stilon de la pekina opero, unu el la eminentaj ĉinaj operoj.

La pekina opero naskiĝis en Pekino en 1790. En sia evoluo ĝi estis multe influita de aliaj ĉinaj operoj, ekz. ĝi asimilis iujn programerojn, ariojn kaj ludartojn de *kunĉju* kaj *ĉinĉjang*, iujn popolajn kantmelodiojn kaj iom post iom formis siajn proprajn stilon de arto kaj ludsistemon. Ĝiaj ĉefaj melodioj estas la altoĉa kaj flukanta *ŝjipi* kaj la serioza *erhŭang*, akompanataj de *ĝinghu*, *erhu*, tri-kaj kvarkordaj instrumentoj, fluto, *surnao* kaj aliaj ĉinaj orkestraj muzi-

kiloj kaj tamtamoj, gongoj, cimbaloj kaj aliaj ĉinaj perkut-instrumentoj. La opero prezentas kantojn, dialogojn, gestojn, batalojn kaj ofte ŝajnajn agojn. En la moderna epoko Ĉeng Canggeng, Tan Ŝinpej, Mej Lanfang kaj aliaj majstroj-artistoj reformis kaj disvolvis la operon, kio siavice forte influis alispecajn operojn. Nun la pekina opero havas pli ol mil tradiciajn programerojn, el kiuj iuj sukcesis speguli la modernan ĉinan vivon.

"Sanĉakoŭ" estas unu el la ĉefaj batalaj programeroj. La aktoroj lerte uzas armilojn longajn kaj mallongajn kaj donas tre gajajn spektaklojn.

Ĉinaj akrobataĵoj

La ĉina akrobatiko ĝermis jam en la Periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj la Militantaj Regnoj (770—221 a. K.) kaj havis sian bazon en Handi-nastio (206 a.K. — 220 p.K.). La argilaj akrobatoj de la Okcidenta Handi-nastio (206 a.K. — 8 p.K.) elterigitaj en 1969 en Ĝjnan, Sandong-provinco, imagigas pri tiamaj interesaj spektakloj.

La leona danco, kiu prezentiĝos en la nacia vespero, ĝuas grandan internacian reputacion. Jam antaŭ 2 000 ja-

roj furoris en Ĉinio la leona danco. Ĝi ankoraŭ trovas vastan ŝaton hodiaŭ. Ĝi havas malsamajn stilojn en malsamaj lokoj de la lando. Ĝenerale, du homoj ludas grandan leonon. Ili devas harmonie kunlabori en saltado, sinjetado, ascendo, turniĝado kaj irado sur pilko.

Krome, en la vespero vi ĝuos ankaŭ aliajn ĉinajn akrobataĵojn, kiaj ekvilibro de bovloj, piedludo de ombrelo kaj manstaro sur seĝoj metitaj unu sur alia.

Ĉetabla etiketo

En bankedo de ĉina stilo, ĉe ĉiu tablo sidas ok aŭ dek personoj. Gastiganto kaj honora sidas sur la honoraj sidlokoj al sudo. Ĉe la komenco de festenado la gastiganto devas preni manĝaĵon el la plej bona plado kaj meti ĝin en la telerojn de la gastoj.

La unuaj pladoj estas malvarmaj por trinkado kaj enhavantaj viandon kaj legomojn. La ĉefaj varmaj pladoj estas kvar aŭ pli, el viando, fiŝo, salikokoj k.a. Oni intermetas ankaŭ unu aŭ du dolĉajn pladojn. Post tio oni

surtabligas pladojn el tuta koko, tuta anaso kaj tuta fiŝo. Fine estas supo kaj rizajo. La frandaĵoj estas metitaj ĉiu en unu pladon, kaj ĉiu festenanto ricevas po unu bovlon da rizajo.

Ĉiu festenanto uzas siajn personajn manĝbastonetojn, tamen sur la tablo estas komunaj manĝbastoneto-paro kaj kulero, per kiuj la festenantoj prenas el la pladoj.

Ne decas ŝmaci dum manĝado aŭ ŝin apogi sur la tablo. Ankaŭ direkti manĝbastonetojn al aliulo estas malĝentile.

Kiel salutas la ĉinoj?

La ĉinoj tre atentigas etiketon. Se oni renkontas konatan samaĝan, oni vokas lian nomon; se pli aĝan, oni devas aldoni Laŭ (signifanta "maljunan" kun respekta nuanco) al lia familia nomo, ekzemple Laŭ Gang, Laŭ Li; se pli juna, oni aldonas Ŝjaŭ (signifanta "junan" aŭ "malgrandan" kun karesa nuanco) al lia familia nomo, ekzemple Ŝjaŭ Ŭang, Ŝjaŭ Ĉen. Por demandi maljunulon (aŭ maljunulinon) pri io, oni devas voki lin (aŭ ŝin) oĉjo (aŭ onjo) aŭ maljuna kamarado (aŭ kamaradino). Por saluti mezaĝulon aŭ junulon, oni vokas lin kamarado. Por informiĝi pri io, oni devas diri: "Mi volus demandi vin..." aŭ "Pardonon, mi petas..." Ricevinte la respondon, oni devas diri dankon.

La etiketo de la nuntempuloj estas multe pli simpla ol tiu de la antikvuloj. Antikve oni devis riverenci al la renkontito kaj alte svingi la kunmetitajn duonpugnigitajn manojn, kaj antaŭ la respektindaj maljunuloj de sia familio oni devis genuiĝi kaj frapeti

sian frunton kontraŭ la plankon. La nuntempuloj salutas unu alian per manpremo kaj poste eldiras sian nomon. Al nekonato oni devas diri "Kiel vi nomiĝas?" aŭ "Kiel mi nomu vin?"


Iuj ĝentilaĵoj de Ĉinio estas samaj al tiuj de aliaj landoj. Ekzemple en aŭtobuso viroj kaj junuloj devas cedi sian sidlokon al maljunuloj, infanoj, gravedulinoj, malsanuloj kaj kripluloj.

Por viziti amikon, oni devas antaŭsciigi lin kaj peti lian konsenton pri la horo de la vizito. Antaŭ ol eniri lian domon, oni devas frapeti je la pordo. Ne decas eniri sen lia permeso.

Ĉe la adiaŭo al nova konato oni ne petas ties adreson, kiam tiu ne memvole informas. Se oni volas teni la interrilaton, oni devas la unua doni al tiu sian adreson kaj poste demandi: "Kiel mi povus kontaktiĝi kun vi?"

Skema mapo de Pekino

1. Tjan'anmen-pordego
2. Imperiestra Palaco
3. Bejhaj-parko
4. Ĝingŝan-parko
5. Ĉiela Altaro
6. Somera Palaco
7. Badaling (Granda Muro)
8. Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio
9. Ĝoŭkoŭdjan
10. Ŭangŭĝing-strato
11. Liŭliĉang-strato
12. Antikva Observatorio
13. Kongresejo
14. Ĉina Teatro
15. Internacia Klubo
16. Flughaveno
17. Stacidomo





AL LA NOVA ETAPO

KONGRESA KURIERO DE LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO EN PEKINO 1986

Sub la aŭspicio de El Popola Ĉinio

Dua numero 27-07-1986

Preludo de la 71-a UK

Sub la diligenta kaj sukcesa aranĝo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS), la ĉi-jara Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto malfermiĝis en la Pekina Lingva Instituto la 22-an de julio. Kvankam la scienca simpozio okazis tute ekster la kadroj de la 71-a UK, tamen, tempe kaj psikologie, ĝi ja ludis la rolon de ties preludo.

Laŭ statistiko la preludon kunludis 238 ĉinaj kaj 52 alilandaj sciencistoj kaj teknikistoj. Tamen, la nombro de la ĉeestantoj de ĝia inaŭguro ja superis 500! Yan Jici, vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso (ĈPK), Zhang Youyu, vicdirektoro de la Komisiono pri Leĝa Sistemo sub la Konstanta Komitato de ĈPK kaj aliaj famuloj kaj sciencistoj de Ĉinio speciale surskribis favore al la konferenco, al Esperanto.

La inaŭguro komenciĝis per la salutvortoj de Yan Dongsheng, vicprezidanto de ĈAS, kiu esprimis sian kredon, ke la kombiniĝo de Esperanto kaj sciencoj sendube akcelos la disvastigon, popularigon kaj aplikadon de la internacia lingvo, kaj ke Ĉinio, kiu havas kvaronon de la tutmonda loĝantaro kaj grandan armeon de diversfakaj sciencistoj kaj teknikistoj, nepre devas fari sian kontribuon tiuflanke.

Huang Hua, vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK, ne nur honoris la inaŭ-

guron per sia persona ĉeesto, sed improvize parolis: "... En la longa historio de Esp-movado la enkonduko de Esperanto en la sferon de sciencoj kaj teknikoj estas pionira laboro. Nia hodiaŭa konferenco ĝuste estas grava paŝo en tia laboro ..."

Interalie ankaŭ Chen Yuan, vicprezidanto de LKK de la 71-a UK, salutis la konferencon en la nomo de LKK. Diverslandaj amikoj, kiaj Umeda Yosimi (UEA), Isobe Yukiko (Japanio), Helmar Frank (FRG), Ralph A. Lewin (Usono), Ludoviko Enizan (Francio), sekvis per varmaj salutvortoj. S-ro Umeda finance kontribuis al la simpozio.

La konferenco ricevis salutajn leterojn kaj telegramojn de famaj sciencistoj, kiuj ne povis ĉeesti la kunvenon pro afero. Inter ili estis Lu Jiayi, prezidanto de ĈAS, Yu Guangyuan, konsilanto de la Ĉina Akademio de Socisciencoj, kaj aliaj.

La konferenco daŭris tri tagojn kaj fermiĝis en la 24-a.

* * *

La Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj fondiĝis la 15an de junio 1984, kun celo enkonduki Esperanton en la sferon de sciencoj kaj teknikoj kaj servigi ĝin al la ĉina modernigo kaj progreso de la homaro. La prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj Lu Jiayi funkcias kiel ĝia honora prezidanto. Multaj eminentuloj kaj famaj sciencistoj estas ĝiaj konsilistoj.

TEATRAJO

Virino Kiu Flustris en Uragano

Lundon okazas en salono Zamenhof teatra prezento de originala Esperanto-teatraĵo kun la titolo "Virino kiu flustris en uragano". La teatraĵo estas bazita je la verko de HASEGAWA Teru (Verda Majo), japana esperantistino, kiu antaŭmilite aktivis en Ĉinio kaj mortis tie en 1947. La originalan tekston de Verda Majo adaptis por la scenejo Spomenka Ŝtimec kaj prezentas ĝin jugoslavia aktorino Vida Jerman. Pri la teatraĵo aperis ankaŭ speciala

arta afiŝo kiun vi povos aĉeti en la libroservo. Ni bonvenigas vin al la teatraĵo — por spekti originalan Esperanto-dramon. Espereble la senriproĉa prononco de Vida Jerman kontribuos ankaŭ al via lingvo ...

La teatraĵo celas informi vin pri la unika sorto de esperantistino, kiu ankaŭ politike engaĝiĝis.

Ni atendas vin lundon je la 20:00 en la salono Zamenhof.

Progresiga Kurso

Se vi volas iom poluri vian lingvoscion, ni rekomendas al vi aliĝi al progresiga kurso. Informon pri ĝi vi trovos ĉe la salono HUIJUCZ. La kurson gvidas Spomenka Ŝtimec el Jugoslavio, kiu disponigas al la kursanoj lernolibron laŭ la zagreba metodo. La kurso okazos sabate (26) 16:00; marde (29) 16:00 — 17:30; ĵaŭde (31) 10:00 — 11:00 en salono Hujucz.

Aŭtobusoj al Diservo

La Diservo okazos en la Chongwenmen-preĝejo je 16:30 dimanĉon. Juna instruisto el Nankina Teologia Seminario predikos, kaj juna sveda pastro gvidos la Diservon. Ĉiuj estas bonvenaj. Aŭtobusoj veturigos al la preĝejo tiujn kiuj volos ĉeesti tuj post la Malfermo en la Ĉina Teatrejo. Ĉiuj estos bonvenaj ankaŭ al la kunveno de KELI lundon je 14:00.

David Featherstone

Ĉina Eksprese

Ĉeestis ĉirkaŭ 60 gesamideanoj. Multaj trovis la ĉinajn ideogramojn komplikaj, malfacile enmemorigeblaj, tamen interesaj. Juna gvidantino Chen Fangfang neniam instruis, sekve tio estis la unua fojo, ke ŝi fariĝis "instruistino" en sia vivo kaj krome, antaŭ esp-ista publiko. Ĝuste antaŭ kelkaj tagoj, ŝi songis, ke ŝi estas gvidanta la kurson ĉin-lingvan. Do, oni povas facile imagi, kiom ŝi jam cerbumis pri sia honora tasko. Kompreneble ne malmultaj laŭdis ŝin malgraŭ ŝia manko de praktiko kaj sperto. Jes, Fangfang bone sukcesis, — laŭ multaj ĉeestintoj.

Programer-ŝanĝoj

Bahaanoj (BEL) okazos marde (29) 10:00 en la salono Verda Majo sed ne 14:00

Korekto: En la tabelo de poŝtaj kostoj en la unua numero, la kostoj de simpla letero kaj aerpoŝta letero devas esti 0.80 kaj 1.10 respektive.

Programo de la 25-a Jarkunveno de UMEA

lunde, la 28. VII. ĉ.j. je la 10:00, salono Hujucz:

1. Malfermaj salutoj,
2. Raportoj el landaj medicinaj sekcioj,
3. Financa raporto,
4. Proponoj kaj pridiskutoj,
5. Akcepto alvokon al ĉiuj medicinistoj,
6. Scienca prelego.

Estas petataj ĉeesti ĉiuj sanlaboristoj-kongresanoj!

Informas Prof. D-ro Med.
Kiril P. Popov
Vicprezidanto de UMEA
Kongresa numero 740

Svisaj Civitanoj

La Svisa Ambasadoro invitas la svisajn gepartoprenantojn de la 71-a UK al aperitivo en la Svisa Ambasadejo.

la 1-an de aŭgusto vespere.

Svisaj civitanoj, kiuj deziras partopreni tiun aperitivan, bonvolu aliĝi ĉe la svisa komitatano A, Dietrich Weidmann (kongresa n-ro 1059) ĝis plej malfrue la 29-an de julio. Detalojn bonvolu peti de li.

Urĝa Anonco

Ni petas jenajn gesamideanojn al la salono Chen Yi de Gazetara Servo kaj kontaktigi kun s-ino Hang Jun de Radio Pekino:

11, 221, 305, 311, 314, 355, 356, 361, 362, 390, 399, 407, 417, 425, 427, 445, 488, 503, 505, 560, 583, 595, 596, 632, 725, 750, 788, 792, 809, 835, 848, 853, 863, 906, 928, 938, 1168, 1202, 1204, 1412, 1686

Radio Pekino

Redaktis Osmo Buller, Leif Gunnar

Nordenstorm, Liu Ling kaj Tan Xiuzhu

«El Popola Ĉinio», disvastiganto de Esperanto

La revuo «El Popola Ĉinio» fondiĝis en februaro 1950. Kiel unu el la plej fruaj fremdlingvaj revuoj de Ĉinio, ĝi distribuiĝas en pli ol 80 landoj kaj regionoj. Ĝi estas fenestro por diverslandaj samideanoj koni Ĉinion.

EPC konigas al siaj legantoj la Esperanto-movadon, ekonomion, sciencojn, teknikon, historion, geografion, socian vivon, kulturon, edukon, lite-

raturon, arton, sporton, sanprotektion kaj naciajn morojn de Ĉinio, kun koloraj kaj nigraj-blankaj bildoj, kiuj fidele prezentas la aspekton de la moderna Ĉinio.

Por disvastigi Esperanton, ĝi dediĉas nemalmultajn paĝojn al artikoloj pri Esperanto, Esp-novaĵoj kaj amikaj rilatoj inter esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj.

La nomoj de ĉinoj

La nomoj de ĉinoj aperis jam en la primitiva socio. La ĉinaj nomoj estiĝis tiel: 1. preni oficon kiel nomon; 2. preni profesion aŭ metion kiel nomon; 3. preni klanon nomon aŭ nobelan titolon de la prapatroj kiel nomon; 4. preni totemon kiel nomon.

La suprajn metodojn de nomiĝo uzis ĉefe la hanoj. En Ĉinio estas 55 nacioplimumoj, kaj la metodoj de ilia nomiĝo estas tre diversaj.

Kiom da familiaj nomoj ekzistas en Ĉinio? La libro "Familiaj Nomoj" kompilita en Song-dinastio (960-1279) entenas 434 unu-ideogramajn kaj 60 du-ideogramajn nomojn. Nun ofte uzataj nomoj estas nur ĉ. 200, el kiuj la plej oftaj estas Gang, Ŭang, Li, Gaŭ kaj Liŭ.

Kutime ĉinoj portas la familian nomon de sia patro kaj tre malmultaj

tiun de sia patrino. En iuj lokoj knaboj portas la familian nomon de sia patro kaj knabinoj tiun de sia patrino. En la malnova socio edzinoj devis porti la familian nomon de sia edzo. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, virinoj ne bezonas ŝanĝi sian familian nomon post la edziniĝo.

La familia nomo antaŭas la personan nomon. La nomo de antikvuloj estis malpli simpla ol tiu de nuntempuloj. Ĉe antikvulo estis nomoj familia, persona, adoltiĝa kaj respekta.

La modernaj ĉinoj portas nur familian nomon kaj personan nomon. Literaturistoj, tradukistoj kaj artistoj kutime havas pseŭdonimon. Iuj homoj ricevas karesnomon en sia mamsuĉa tempo. Generale la nomoj spegulas la esperon de la nomdonantoj.

Ĉinaj pladoj

La ĉinaj pladoj famas pro siaj plaĉaj koloroj, gustoj kaj aromo. Ili estas ne nur ĝuidaj por la ĉina popolo, sed kredeble interesaj ankaŭ por niaj samideanoj ĉeestantaj la 71-an UK.


La plej famaj ĉinaj pladoj apartenas al kvar sistemoj, nome la plad-sistemoj de la provincoj Ŝandong, Siĉŭan, Ĝjangsu kaj Ĝuangdong, aldone kvar aliaj, nome tiuj de Pekino, Fuĝjan, Anhuĵ kaj Ĝeĝjang. Krom la supraj, troviĝas ankaŭ aliaj famaj lokaj pladoj, kiaj tiuj de Hunan, Jangŝou kaj Junnan. Estas distingiĝaj ankaŭ familiaj pladoj kun originala gusto, ekz. tiuj de Tan-familio.

En la ĉina kuirarto oni emfazas delikatan tranĉadon. Kuiristoj devas doni al materialoj diversajn formojn: maldikaj tranĉaĵoj, kubo, strioj, pecoj, grajnoj, haketaĵo kaj floroj, por ke ĉi tiuj facile sorbu la spicojn kaj ricevu belan aspekton. Ankaŭ la gustoj estas emfazataj. Lertaj kuiristoj scias uzi diversajn spicojn por forigi ian odoraĉon kaj kombini la gustojn salan, dolĉan, acidan, pikan kaj nesensivigan en dekojn da malsamaj gustoj. La ĉinaj pladoj havas belajn aspektojn kaj nomojn, kiuj faras ilin pli apetitivekaj.

Ili preparaj metodoj estas tre variaj: fritado, fortfajra kaj etfajra kuirado, stufado, kuirado en bolakvo, brogado en bolakvo, patkuirado, rostado, senakva stufado, senakva kuirado, fumajado, vaporumado kaj multaj aliaj.

Laŭ nekompleta statistiko, estas miloj da specoj de ĉinaj pladoj.

Katolika katedralo



La pekina anaso estas vulgare nomata blanka anaso aŭ ŝtopnutrita anaso. Ĝi estas unuaranga inter la pli ol 20 bonaj anaspecoj de Ĉinio.

La pekinaj anasoj vivas en la antaŭurbo de Pekino riĉa je akvoherboj, fiŝoj kaj salikokoj. La anasidoj surhavas flavan lanugon tutkorpe kaj, grandiĝinte, ricevas blankan plumaron. Tiam ili fariĝas graciaj. Post duonjaro la anasinoj jam povas demeti ovojn, tial ili estas bona specio donanta ovojn kaj karnon. Oni ŝtopnutras pekinajn anasojn duonmonaton antaŭ la buĉado al ili, tial ili ricevis la nomon ŝtopnutrita anaso. En tiel mallonga tempo la korpopezo de pekina anaso pliiĝas je unu kilogramo.

Ĝia karno estas delikata kun graso ene. Pro rostado la graso penetras en la karnon. Tial la rostita anaso estas haŭte fragila, apetitiveka kaj ne grase impresata. Ĝuste pro tio la rostita pekina anaso estas multe laŭdata de klientoj ĉinaj kaj alilandaj kaj rigardata kiel unu el la mondfamaj pladoj.


Estas oportune ĝui rostitan anason en Pekino. La restoracioj Ĉjuangjude ĉe la stratoj Ĉjanmen, Ŭangfuĝing kaj Hepingmen servas speciale per rostitaj pekinaj anasoj kaj estas famaj tra Ĉinio, kaj similaj restoracioj dislokiĝas tra la urbo. Ili ĉiam bonvenigas vin, gastojn el diversaj landoj.

Kiel uzi manĝbastonetojn?

Ĉinoj prenas manĝon per manĝbastonetoj kaj supon per kulero.

En la ĉina kuirarto, ĉu legomo ĉu viando ĉu estas tranĉita en malgrandajn pecojn kaj sufiĉe longe kuirita, tial forko ne taŭgas por uzo. Dum manĝado oni tiel uzas manĝbastonetojn: Fiksi la mezan parton de unu el la manĝbastonetoparo ĉe la unga falango de la ringa fingro iom fleksita, la supran parton en loko inter la dika kaj montra fingroj; teni la alian kiel kraĵonon, inter la unĝaj falangoj de la dika, montra kaj meza fingroj; teni la du bastonetojn en sama alto kaj milde movi la mezan kaj montran fingrojn por povi disigi kaj kunigi la bastonetojn kaj tiel preni manĝaĵon.

La specoj de manĝbastonetoj estas tre multaj. En la merkato oni povas vidi pli ol 250 specojn de manĝbastonetoj. Por fari manĝbastonetojn oni uzas bestan ostojn, lakon, lignon, bambuon, plaston, arĝenton, jardon k.a.



Katedraloj en Pekino

La pekina katolika diocezo havas kvar grandajn katedralojn orientan, okcidentan, sudan kaj nordan kaj kelkajn malgrandajn katedralojn. El la kvar katedraloj tri funkcias, escepte de la okcidenta katedralo fermita pro manko de riparo.

La suda katedralo situanta ĉe Ŝjuan'umen estas episkopa katedralo de la pekina diocezo kaj povas enteni mil homojn. De la 6-a ĝis la 9-a matene oni faras tie tri mesojn kaj de la 6-a ĝis duono post la 9-a dimanĉe

kvar mesojn. La suda katedralo konstruiĝis en 1650 kaj estis dufoje bruligita. Ĝi estis restarigita poste en 1904.

La norda katedralo, la sidejo de la Pekina Kardinala Oficejo, situas ĉe la strato Ŝjiŝiku. Komence ĝi havis sian lokon okcidente de Ĝonghaj-lago kaj inaŭguriĝis en decembro de 1703. Tiam ĝi nomiĝis Katedralo de la Savanto. La imperiestro Kangŝji (1662-1722 sur trono) donacis al ĝi pendotabulon kun lia aŭtografio "Vera Origino de Ĉio" kaj versparon. La katedralo translokiĝis al la nuna loko en 1887 pro plivastigo de la imperiestra ĝardeno kaj ekhavis novan aspekton post plurfoja rekonstruado. Ĝi povas enteni ĉ. 1 200 homojn kaj estas la plej granda katedralo en la pekina diocezo.

La orienta katedralo sur la strato Ŭangfuĝing, nomata Sankta Jozefo, konstruiĝis en 1655.

En Pekino troviĝas tri kristanismaj preĝejoj, el kiuj la plej granda estas Ĉongŭenmen sur la strateto Ŝjaŭŝun, ĉe la strato Dongdan Nandaĝje. Ĝi konstruiĝis en 1900 kaj ekfunkciis en 1982 post riparo. La preĝejo Gangŭaŝi situas ĉe Ŝjisi. La preĝejo Hajdjan situanta ĉe Ŝjeŝujhu en Hajdjan-distrikto estas la plej proksima al la kongresejo. La tri preĝejoj faras preĝon ĉiudimanĉe je la 10-a atm. kaj vesperan preĝon ĉiusabate.



AL LA NOVA ETAPO

KONGRESA KURIERO DE LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO EN PEKINO 1986

Sub la aŭspicio de El Popola Ĉinio

Tria numero 28-07-1986

Inaŭguriĝis la Plej Granda Kongreso ekster Eŭropo

La 27an de julio, la lastan dimanĉon de tiu monato, la solena inaŭguro de la 71a Universala Kongreso de Esperanto kun ĉ. 2000 partoprenantoj el diversaj partoj de la

mondo okazis en varma etoso en la Ĉina Teatrejo. Ĝi komenciĝis per la himno "La Espero" ĥore kantita de 70 bulgaraj kaj ĉinaj esperantistoj en naciaj kostumoj.



S-ro Grégoire Maertens dankas s-ron Huang Hua pro lia parolado.

La inaŭguron prezidis s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA.

S-ro Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, salutis la Kongreson en la nomo de s-ro Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj alta protektanto de tiu ĉi Kongreso, kaj en sia propra nomo, kiel prezidanto de la Honora Komitato de la Kongreso.

Kun bona kompreno pri nia lingvo li diris, ke Esperanto mem estas granda idealo, granda strebo kaj ankaŭ granda praktiko. Ĝia centjara ekzisto kaj disvolviĝo plene montras ĝian fortan vivipovon.

Per sia rememoro al la historio de la ĉina Esperanto-movado li rimarkigis: "La ĉina popolo havas longan tradicion en la amo al Esperanto. . . Sincere dirite, nia kontribuo al Esperanto estas nek tiel granda nek impona, kiel lando kun vasta teritorio kaj multa loĝantaro, kia la nia, devus fari. Ĉinio

havas miliardon da loĝantoj, preskaŭ kvaronon de la tutmonda loĝantaro. Nia lando, kompreneble, devas fari pli multe da kontribuoj al la homaro, kaj ankaŭ al la granda idealo de Esperanto.

Rilate al la kongresa temo "Interkompreniĝo, paco, evoluo", li diris, ke ĝi estas ege trafa, ĉu kiel omaĝo al la Internacia Jaro de Paco, ĉu kiel atentigo pri la aktuale urĝaj problemoj de la homaro. Ekde sia naskiĝo Esperanto ligiĝas kun pacaj idealoj. La nuna Kongreso estas aparte signifa kiel unu el la gravaj aktivadoj de la Internacia Jaro de Paco.

S-ro Chen Yuan, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-ligo, salutis la Kongreson en la nomoj de LKK kaj ĈEL. En sia parolado li esprimis ne nur varman bonvenigon al ĉiuj kongresanoj el diversaj landoj, sed ankaŭ petis afablan pardonon de tiuj, kiuj renkontis, renkontas kaj renkontos malfacilojn kaj malfacilaĵojn en Ĉinio, pro la sensperiteco de LKK, kiu ja unuafoje organizas tiel grandan kongreson.

Salutis la Kongreson ankaŭ s-ro Chu Tunan, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, en la nomo de la prezidanto de la Societo "Amikoj de Esperanto", kiu konsistas el eminentaj personoj de diversaj vivosferoj. Li diris, ke kvankam kelkaj el la societo ne lernis Esperanton, tamen ili bone scias, ke la lingva baro estas forta ĝeno kontraŭ la progreso de la homaro. Por forigi tiun ĝenon, necesas internacia lingvo.

Kiel sincera Esperanto-amiko, li kore esprimis, ke Esperanto estos popularigita kaj uzata en pli kaj pli vasta tereno kaj fine en ne tre malproksima estonteco ĝenerale agnoskita internacie.

La kongresanojn forte interesas kaj inspiras, ke vicurbestro de Pekino Chen Haosu salutis la Kongreson plejparte en Esperanto por montri sian grandan simpatian al nia lingvo.

Post la parolo de s-ro Chen Haosu

estis paŭzeto, dum kiu la fama juna bivistino He Shufeng plezurigis la kongresanojn per ludado de ĉina klasika komponaĵo kaj rikoltis bonegan akcepton.

Post la ludado sinsekve salutis la Kongreson diplomaciaj reprezentantoj de diversaj landoj en Ĉinio, inter kiuj ambasada konsilisto de Pollando parolis tute Esperante, kaj tio vekis varman aplaudadon.

D-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, faris gravan prelegon pri la kongresa temo "Interkompreniĝo, paco, evoluo".

Je la fino de la inaŭguro s-ro Grégoire Maertens esprimis koran dankon al ĉiuj honoraj komitatanoj, kiuj honoris nian Kongreson per sia ĉeesto. Li diris, ke unuafoje, tiel multaj honoraj komitatanoj ĉeestas nian Kongreson. Kompreneble ĉinaj esperantistoj certe fieras pro tio kaj atendas ilian daŭran subtenon.

La tuta inaŭguro daŭris du kaj duonan horojn.

Invito al Kunveno pri Junularo

Laŭ iniciato de la Komitato de UEA, kunvenos speciala komisiono de UEA pri junularo la 29an de julio inter 14:00 kaj 15:30 en salo-

no Baghy. Oni invitas al partopreno ĉiun interesiton pri la junulara Esperanto-agado. Prezidos Barbara Despinye.

Ian Jackson,

Prezidanto de TEJO

Grava Korekto

En la informo pri la teatraĵo "Virino kiu flustris en uragano"

aperinta en la dua numero, la lasta frazo devas esti: **Ni atendas vin lundon je la 20:00 en la Ĉina Teatrejo.**

Mardo, 29. 7. 1986, 8:30 — 11:30 Salono Zamenhof

9-a Esperantologia Konferenco

"Internacieco de Esperanto el neeŭropa vidpunkto"

Malfermo: D-ro sc. Detlev Blanke (GDR)

Prelegoj kaj diskuto:

1. **D-ro Dan Maxwell** (Usono)
"Ĝeneralaj homaj kapabloj kaj antaŭkonoj rilate lingvolernadon"
2. **D-ro Julius Balbin** (Usono)
"Ĉu Esperanto estas latinida lingvo?"
3. **Ilona Koutny** (Hungario)
"Esperanto kaj la aglutinaj lingvoj"
4. **KURISU Kei** (Japanio)
"Malfacilaĵoj de Esperanto por japanoj"
5. **NAGATA Akiko** (Japanio/Nederlando)
"Lingvikaj vortoj de Esperanto, el vidpunkto de japan-lingvano"
6. **D-ro Amri Wandel** (Israelo)
"La Lingvo Internacia el ekstereŭropa perspektivo"

EPC-INFORMILO

TRIA NUMERO



Muzeoj en Pekino

La Muzeo de la Ĉina Revolucio sidas oriente de Tjan'anmen-placo. En ĝi konserviĝas materialoj de la ĉina moderna historio, komencita de la Movado de la 4-a de Majo 1919.

La Muzeo de la Ĉina Historio sidas oriente de Tjan'anmen-placo. En ĝi konserviĝas ĉ. 9 000 historiaj objektoj antaŭ 1919, inkl. de fosilio de kranio de Ĵianmoŭ-homo antaŭ 1.7 milionoj da jaroj.

La Muzeo de la Ĉina Popola Revolucia Milito sidas sude de la parko Jujŭantan. En ĝi estas montrataj historiaj objektoj kaj fotoj de la Dua kaj Tria Enlandaj Militoj kaj la Kontraŭjapana Rezistmilito.

La Muzeo de Lusin sidas ĉe la strato Fuĉengmennej. Ĝi estas konstruita memore al la granda ĉina literaturisto, pensulo kaj revoluciulo Lusin. En ĝi konserviĝas granda kvanto da liaj manuskriptoj, poemoj, tradukoj, libroj kaj leteroj.

La Muzeo de Natura Historio sidas ĉe Tjanĉjau-strato. Ĝi konsistas

el kvar eksponejoj de vegetaloj, bestoj, prabestoj kaj prahomoj, kiuj prezentas la evoluon de senvivaj materialoj kaj malaltklasaj vivaj estaĵoj al altklasaj vivaj estaĵoj kaj de simiĥomoj al homoj.

La Geologia Muzeo sidas en Sĵisi. Ĝi konigas mineralajn riĉfontojn, la historion de la tero, paleontologian stratumon kaj mineralajn deponejojn.

Ĝoŭkoŭdjan, hejmloko de Pekin-homoj sidas en Fangŝan-gubernio, kie vivis Pekin-homoj antaŭ 500 000 jaroj.

La Muzeo de Antikvaj Sonoriloj de Daĝong-templo troviĝas ĉe la Norda Erhŭan-strato en Hajdjan-distrikto. En ĝi konserviĝas 161 ĉinaj antikvaj sonoriloj faritaj en la periodo de la primitiva socio ĝis la 19-a jarcento. El ili la plej granda estas Jongle, farita en 1403 — 1424 kaj nomata la reĝo de la sonoriloj, kun alteco de pli ol 6 metroj kaj pezo de 46 tunoj. Ĝi surhavas mulditan sutron kun pli ol 230 000 ideo-grafiaĵoj.

La Imperiestra Palaco

La Imperiestra Palaco en Pekino, alinome la Malpermesita Urbo, estas la plej grandioza el la antikvaj palacoj en la mondo. Ĝi situas en la mezo de Pekino, kun areo de 73 hektaroj. Ĝi havas pli ol 9 000 ĉambrojn kovrantajn 150 000 kvadratajn metrojn.

Ĝu Di, imperiestro de Ming-dinastio, ekkonstruis ĝin en la komenco de la 15-a jarcento, kaj la konstruado daŭris 14 jarojn. En la palaco vivis 24 imperiestroj de la dinastioj Ming kaj Ĉing. En 1911 la lasta imperiestro de Ĉing-dinastio detroniĝis kaj transloĝiĝis el la palaco en 1925. Tiel la palaco fariĝis muzeo malfermita al la popolo.

En la palaco vi povas ĝui ĝiajn imponecon, grandiozecon, striktan dispozicion kaj varistilan arkitekturon. La plej allogaj estas la haloj Tajhe, Ĝonghe kaj Baŭhe, konstruitaj sur blankmarmora bazamento alta je 8 metroj. Rigardate de malproksime, ili aspektas kiel feaj pavilonoj. Krome, vi povas rigardi ankaŭ objektojn uzitajn de la Ĉing-dinastiaj imperiestroj kaj iliaj edzinoj kaj grandan kvanton da valoraj historiaj objektoj konservataj en la palaco, kiel portretoj de diversdinastiaj imperiestroj kaj iliaj edzinoj, pentraĵoj kaj kaligrafaĵoj de famaj pentristoj kaj kaligrafoj de diversaj tempoj kaj multego da raraj trezoroj kaj tre valoraj artaĵoj.

Tjan'anmen-placo

En la centro de Pekino estas alta, ruĝa ligna konstruaĵo sur pordego, kun ruĝe farbitaj kolonoj kaj duobla tegmento el flave glazuritaj tegoloj. Ĝi estas la pordego Tjan'anmen sude de la Imperiestra Palaco. Antaŭ ĝi etendiĝas la vasta placo Tjan'anmen.

Tjan'anmen-pordego alfrontas la Eksteran Oran Riveron, super kiu kuŝas sep belaj ruband-similaj blankmarmoraj pontoj ĉiu kun ŝtongravuraj balustradoj. Sude de la mezaj pontoj staras ornamaj kolonoj el blanka marmoro kaj ĉe la sudaj kaj nordaj flankoj de la pontoj kaŭras blankmarmoraj leonoj.

Ruĝa kvinstela flago flirtas meze de la placo kaj la Monumento de Popolaj Herooj staras en ĝia sudo. Sur la monumento gravuriĝis la skribaĵo de Prezidanto Maŭ Zedong "Eternan Gloron al la Popolaj Herooj", epigrafo skribita de ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj grandaj reliefoj pri la revolucia historio de la ĉina popolo.

Sude de la monumento estas la Memorhalo de Prezidanto Maŭ Zedong. Okcidente de la placo estas la Popola Halo kaj oriente la Muzeo de la Ĉina Revolucio kaj la Muzeo de la Ĉina Historio.

Longa koridoro

En la bela Somera Palaco estas kolora galerio, kiu allogas la vizitantojn. Jen la landfama Longa Koridoro.

La Longa Koridoro zigzagas inter Kunming-lago en sudo kaj Uanŝou-monto en nordo, kun longeco de pli ol 700 metroj, el 273 sekcioj. La koridoro ĉarmas per pentraĵoj sur la traboj. Estas kolore pentritaj peonioj, lotusfloroj, birdoj, fiŝoj, sudĉiniaj ĝardenoj, pavilonoj, lagoj kaj homfiguroj. En ili la plej rigardindaj estas la versimilaj homfiguroj.

La homfiguroj devenas de historiaj

rakontoj, popolaj legendoj, klasikaj romanoj, mitoj, fabeloj, teatraĵoj, poemoj kaj anekdotoj, kiuj priskribas la diligentecon de la ĉinoj en lernado kaj iliajn bonkorecon kaj ĝentilecon, kaj la historian evoluon en kvin mil jaroj de la primitiva socio ĝis la lasta dinastio de la feŭda socio, dum kiuj la ĉina popolo rezistis kontraŭ la invado de la eksteraj malamikoj kaj faris amikan kontakton inter si. Oni povas diri, ke la Longa Koridoro estas kroniko, ĝenro kaj fenestro por koni la civilizacion kaj kulturen historion de la ĉina nacio.

Budhismaj temploj en Pekino

Jenaj budhismaj temploj de Pekino konstruitaj en la antikveco nun estas lokoj por religia aktivado aŭ por turismo.

Ĝuangĝji-templo situanta en Sĵisi estas unu el la plej famaj temploj de Pekino. Ĝi konstruiĝis antaŭ 800 jaroj, kun kvar haloj kaj multaj aliaj konstruaĵoj. Ĝi konservas grandan nombron da Dazang-sutroj kaj antikvaj budhismaj pentraĵoj kaj nun estas la sidejo de la Ĉina Budhisma Asocio. Fajŭan-templo sur la strato Ŝjŭan'umenŭaj havas historion de pli ol 1 300 jaroj kaj nun estas la sidejo de la Ĉina Budhisma Seminario, la plej alta lernejo por la ĉinaj bonzoj.

Tange-templo kun historio de pli ol 1 600 jaroj estas la plej antikva templo en Pekino. Sur monto malantaŭ la templo troviĝas lageto kaj la pejzaĝo estas tre bela. Bijun-templo ĉe Ŝjangŝan-monto havas konstruaĵojn de ses altecoj. Ĝiaj Vajra Pagodo plej alte en la templo kaj 500-arhata

halo estas valoraj budhismaj artaĵoj. La Templo de Kuŝanta Budho ĉe la piedo de Ŝou'an-monto kultas grandan kuŝantan budhon 5 metrojn longan, kiu, muldita el 54 tunoj da laŭtuno, estas valora religia artaĵo.

Jonghegong-templo en la orienta parto de Pekino havas kvin halojn. En ĝi estas statuo de Budho Majtreja, skulptita el sola santala trunko 25 metrojn longa. La templon administras lamaoj venintaj el la Interna Mongolio kaj Tibeto. Ŝjihŭang-templo sur la strato Andingmenŭaj havas originalan konstruan arton. Ĝiaj kvin pagodoj konstruiĝis sur granda bazamento, kaj ĝia lamaisma pagodo en tibeta stilo surhavas delikatajn gravuraĵojn.

Krome, ankaŭ la blanka pagodo de Mjaŭjing-templo, la vajra pagodaro de la Kvin-pagoda Templo, la grandaj sonoriloj de Ĝjueŝeng-templo kaj la freskoj de Fahaj-templo estas famaj vidindaĵoj de Pekino.

Apoteko Tongĵentang

Tongĵentang, unu el la plej antikvaj ĉinstilaj apotekoj en Pekino, situas sur la strato Daĝalan, ekster Ĉjanmenpordego. Ĝi havas historion de pli ol 300 jaroj.

Ĝi estas fama pro la de ĝi preparitaj piloloj, pulvoroj, plastoj kaj bolusoj. El la 400 specoj de medikamentoj preparitaj de ĝi la plej famaj estas *Angongniŭhŭangŭan*, *Ziŝjŭesan* kaj *Ĝjufangĝibaŭdan* kontraŭ febro kaj sveno, *Suheŝjangŭan* kontraŭ cerbaj afekcioj, *Zajzaŭŭan*, *Dahŭolŭoŭdan* kaj *Niŭhŭangĝingŝinŭan* kontraŭ hemiplegio, *Njuĝindan* por reguligi la menstruan funkcion kaj akceli la sangon cirkuladon, Pilolo de Ginsengo kaj Cervokorno por kuraci mankon de vitala energio kaj Tigrosta Alkoholaĵo por kuraci reŭmatismojn kaj fortigi la korpon. Krome, la apoteko preparas ankaŭ la pilolon *Uĝjibajfengŭan* por kuraci virinajn malsanojn.

Ginsengo, vendata de Tongĵentang, estas bonkvalita, multspeca kaj prezoinda. Estas akirebla sovaĝa ginsengo, kreskinta en monto, kontraŭ mil ĵuanoj por ĉiu gramo; oni povas ankaŭ aĉeti unu gramon da kulturita ginsengo per kelkaj ĵuanoj.

La medikamentoj faritaj de Tongĵentang estas bonkvalitaj unue pro ĝiaj apartaj receptoj. Ĝi preparas medikamentojn laŭ antikvaj receptoj, popolaj receptoj kaj sekretaj kortegaj receptoj. Ĝi ĉerpas la eliton de la ĉinaj receptoj. Aliflanke, ĝi uzas la plej bonajn materialojn kaj aplikas eminentan teknikon. Ĝi preparas medikamentojn serioze kaj lerte, ne domagante tempon kaj produktokoston.

Tongĵentang ĉiam ĝuas konfidon de la klientoj ankaŭ pro sia racia butikado kaj bona servado.



AL LA NOVA ETAPO

KONGRESA KURIERO DE LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO EN PEKINO 1986

Sub la aŭspicio de El Popola Ĉinio

Kvara numero 29-07-1986

Honore al Niaj Kongresaninoj

La Ĉina Virina Federacio okazigos akcepton honore al reprezentantoj de la kongresaninoj la 1-an de aŭgusto, en sia oficejo. Unu el la estraranoj de la federacio estas membro de nia honora komitato. Ŝi volas esprimi profitante la okazon varman bonvenigon kaj bondeziron al ĉiuj kongresaninoj kaj amikecon de ĉinaj virinoj por niaj samideaninoj.

La Jubilea Kongreso Kongresontoj Atentu!!!

Loka Kongresa Komitato de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio informas, ke ekde mardo, la 29-a de julio ekfunkciis speciala giĉeto por aliĝoj kaj ĉiuspecaj informoj pri la Jubilea Kongreso okazonta en Varsovio de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987. La giĉeto funkcias en la salono DAMJANOV (kongreseja kelo) de 9:00 ĝis 11:30 kaj de 14:00 ĝis 18:00 — ĉiutage, escepte de merkredo (tuttaga ekskurso). Ni kore invitas vin al nia giĉeto: venu, informiĝu kaj aliĝu!!!

Stanisław Świstak
Prezidanto de LKK

Iri per taksio

Kelkaj kongresanoj spertis malfacilaĵojn klarigi al taksiŝoforoj la deziratan alvenlokon. Tial ni publikigas liston de ĉinlingvaj nomoj de gravaj lokoj:

Hotelo Amikeco 友谊宾馆
Hotelo Xiyuan 西苑饭店
Hotelo Longtan 龙潭宾馆
Amasloĝejo 人大附中
(海淀区, 黄庄)
Ĉina Teatrejo 中国大剧场
(西三环路)
Ĉefurba Teatrejo 首都剧场
(王府井大街)
Flughaveno 首都机场
Stacidomo 北京火车站

Tajĝiĉuan Plaĉas al Multaj

Ekde la 27-a jam komenciĝis la Tajĝiĉuan-kurso. En la unua mateno ĝin ĉeestis ĉirkaŭ 100 kongresanoj. Kun granda intereso ili faras tiun gimnastikon sub la gvido de s-ro Liu Ling, sur la placo antaŭ la teatrejo de la Amikeca Hotelo. La ekzercado estas saniga kaj efika precipe por maljunuloj kaj malfortuloj kontraŭ kronikaj malsanoj. Se vi ankoraŭ ne ĉeestis la kurson, bonvolu ĝin viziti.

Unika Ebleco

En la kongresa libroservo aĉeteblas la plena, ĝis nun aperanta serio de INTERNACIA KOMPUTADO. Ĝia provnumero prezentigis dum la 68a UK en Budapeŝto. Ekde tiu tempo jam aperis sep numeroj, ekzemple pri datumbazoj, perkomputila instruado, retoj, programada teknologio. Ĉiun volumon kompletigas interesa, inform-riĉa rubriko: Mikrokomputilo.

Kie la Junulara Vespero?

La Junulara Vespero, kies loko estis ĝis nun ne anoncita en la kongresaj dokumentoj, okazos en plimalpli granda kaj komforta dancejo de la ĉefa domo en la Hotelo de Amikeco, tute proksime al la kongresejo. La difinita tempo restas senŝanĝa: la 30an de julio (merkredo), 20:00 — 22:30

Ĉiuj kongresanoj estas bonvenaj.

Konversacia Rondo

Okazos lunde, ĵaŭde kaj vendrede en du grupoj: matene 10:00-11:30 (salonoj Grabowski, Venlo Fon kaj Hujucz sinsekve) kaj posttagmeze 15:00-15:30 (Hujucz, Grabowski, Hujucz). Ilona KOUTNY kaj Stefan MACGILL gvidas la kursojn.

Informkunsido pri la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)

La membroj de la Internacia Scienca Kolegio (ISK) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino havos renkontiĝon en salono Jung vendredon, la unuan de aŭgusto 8:30 ĝis 10:00 h. La kunsido estas publika. Estos raporto pri la nuna stato de AIS post la oficiala fondo kaj la parlamenta akcepto de la koncerna leĝo.

Atentu:

Folkloro vespero: "Silka Vojo" okazos en Ĉefurba Teatrejo mardon la 29an de julio. Ne misprenu Ĉinan Teatrejon por Ĉefurba Teatrejo.

La Rendevua Tabulo troviĝas en la kongreseja kelo (salono Damjanov).

Kongresan stampon por sendotaj poŝtkartoj kaj leteroj oni povas ricevi en kongreseja kelo 9:00 — 11:30 kaj 2:00 — 5:00.

Adresaro

2120	fnyv-v	Fenyvesi Prof. Ervin Ujvidék u. 58 1145 Budapest Hungarujo
2121	gaja-p	Gajzágó Istvánné Hungarujo
2122	izol-r	Zoltán S-ro Imre Minerva u. 5 1118 Budapest Hungarujo
2123	jkec-p	Jáki D-ro Ferenc Fogarasi út 35 I. 6 1148 Budapest Hungarujo
2124	lone-f	Szilvási S-ro Lászlóne ĉe HEA Pf. 193 1368 Budapest Hungarujo
2125	pata-j	Pataki S-ino Nária Lajosné Róbert Károly krt. 20. IV. 54 1138 Budapest Hungarujo
2126	szla-m	Szilvási S-ro László ĉe H.E.A. Pf. 193 1368 Budapest Hungarujo
2127	zsla-t	Zsoldos S-ro László Somlói út 50/a 1118 Budapest Hungarujo
2128	mkoc-v	Kočiš S-ro Milan Hanamanova 12 41000 Zagreb-Voltino Jugoslavio
2129	ospr-s	Princz S-ro Cszkár Sallai u. 4. II. 3. 1136 Budapest Hungarujo
2130	dipp-c	Dippel S-ino Susanne Höhlsgasse 3 3550 Marburg FR Germanujo
2131	josk-l	Joŝino S-ro Kijoaki 29-3 Uchara 3-c Sibuya-ku 151 Tôkyô Japanujo
2132	micu-l	Micukaŭa S-ino Sumiko 33 Kamihom-maĉi Ŝiĉiku, Kitaku 603 Kyôtô Japanujo
2133	freh-d	Helmuth S-ro Francis E. P.O. Box 918 CA 92036 Julian USA
2134	glmh-n	Helmuth S-ino Gloria Macias P.O. Box 918 CA 92036 Julian USA
2135	bjro-a	Jedzejczyk-Rokicka S-ino Barbara ul. Kolorowa 9 05-815 Michaowice Pollando
2136	mgmi-l	Milne S-ino Marguerite G. Pantresgair Llanfair SA48 8LJ Lampeter, Dyfed Britujo
2137	arte-u	Martínez Arango María Jesús Urzaiz 84, 2' B 36204 Vigo Hispanujo
2138	gado-v	Delgado Suárez María Rosa Urzaiz 84, 2' B 36204 Vigo Hispanujo

Redaktis Osmo Buller, Leif Gunnar

Nordenstorm, Liu Ling kaj Tan Xiuzhu

EPĈ-INFORMILO

KVARA NUMERO



Preĝejo de Riĉa Rikolto

Pekinaj metiartaĵoj

La jadaj skulptaĵoj de Pekino aperis jam antaŭ mil jaroj. Ili, forme modestaj, elegantaj, ĝuas grandan renomon internacie. Inter la multspecaj jadaj skulptaĵoj de Pekino estas pejzaĝa artaĵo proksimume unu metron alta kaj orependaĵo en grandeco de riz-grajno.

La eburaj skulptaĵoj estas alia fama speco de la pekinaj metiartaĵoj. Ili, karakterizitaj per antikva palaca lukseco kaj moderna gracieco kaj ornameco, spiras fortan vivetoson. Inter la pekinaj eburaj skulptaĵoj estas tiuj de homfiguroj, floroj, arboj, montoj kaj riveroj kaj tiuj pri historiaj rakontoj kaj legendoj.

Klozoneaĵoj kaj gravuritaj lakaĵoj estas aliaj du ĉefaj specoj de la pe-

kinaj metiartaĵoj. La klozoneaĵoj estas farataj tiamaniere: Unue oni faras korpon el kupro kaj poste desegnojn el kupraj dratoj sur ĝi. Oni tegas la tutan korpon per diverskolora emajlo kaj ĝin bakas. Fine oni ĝin poluras kaj oras. Tiel oni pretigas la belan klozoneaĵon. La gravuritaj lakaĵoj estas farataj laŭ jena maniero: Oni faras korpon el kupro kaj tegas ĝin per 100 ĝis 500 tavoloj da lako. Post kiam la lako sekigas, oni ĉizas la lakan tegadon. La ofte vidataj gravuritaj lakaĵoj estas vazoj, teleroj, skatoloj kaj potoj luksaj kaj delikataj.

Krom la supraj, inter la pekinaj metiartaĵoj estas ankaŭ aliaj dekoj da specoj, kiaj filigranaj artaĵoj, tapiŝoj, lignaj skulptaĵoj, modlitaj figuroj kaj kajtoj.

La kultura strato Liŭliĉang

Liŭliĉang en Pekino estas fame konata kiel antikva kultura strato. Jam antaŭ cent jaroj ĝi fariĝis loko, kie oni vendis ĉefe librojn, kaligrafiaĵojn kaj skribilojn.

Hodiaŭ Liŭliĉang ankoraŭ konservas sian tradicion. Ambaŭflanke de la strato funkcias ĉ. cent butikoj. Inter ili estas Ĵongbaŭĝaj, kiu aĉetas kaj vendas ĉefe kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn de eminentuloj antikvaj kaj nuntempaj, Ĵunguĝaj kaj Cujĝenĝaj, kiuj vendas ĉefe kolorajn fajencaĵojn en antikva stilo kaj brilajn porcelanaĵojn faritajn de famaj produktistoj de diversaj dinastioj de Ĉinio, Ĝenĥuange kaj Junjuĝaj, kiuj vendas ĉefe antikvajn bronzaĵojn, klozoneaĵojn, eburajn kaj jadajn skulptaĵojn kaj ŝtonajn gravuraĵojn, kaj Baŭguĝaj, kiu vendas, krom kaligrafiaĵoj kaj

pentraĵoj, ankaŭ diversajn ventumilojn. La butikoj Motongge servas per belartaĵoj modernaj kaj nuntempaj; la butikoj Ĉingjuntang vendas kopiojn de steleaj surskriboj de diversaj dinastioj de Ĉinio; la butikoj Ĝuanfuĝaj famas pro sia vendado de ĉinaj inkpecoj, ŝtonplataj inkujoj kaj sigeliloj; kaj Ĝjiguge estas alia fama butikoj, kiu vendas kolorajn kaj nigrajn kopiojn de steleaj surskriboj de diversaj dinastioj de Ĉinio kaj imitaĵojn de ĉinaj elterigitaj objektoj. La Ĉina Librejo, servanta per ĉinaj klasikaj verkoj, funkciigas tie tri vendejojn, kiuj vendas antikvajn librojn kaj gazetojn, nove eldonitajn klasikajn verkojn, aĉetas ksilografiajn eldonaĵojn, mankopiitajn librojn, antikvajn librojn presitajn per tipografio kaj litografio, bindas kaj riparas por klientoj antikvajn librojn kaj gazetojn.

Ĵongbaŭĝaj

Ĵongbaŭĝaj sur la kultura strato Liŭliĉang en Pekino estas vendejo fama pro siaj antikvaj kaj modernaj kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj.

La vendejo, antaŭe nomata Songguĝaj, ekfunkciis en la unuaj jaroj de Ĉing-dinastio (1644-1911 p. K.). Ĝi estis destinita por kolekti originalajn kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn de famaj personoj de diversaj dinastioj de Ĉinio, kopii kaj reprodukti eminentajn verkojn kaj tapeti pentraĵojn. Ĝi ankaŭ vendis paperon, ĉinajn inkpecojn, penikojn kaj ŝtonplatajn inkujojn, bronzaĵojn kaj ŝtonajn grifelaĵojn kaj aliajn tradiciajn metiartaĵojn.

Ekde 1953 la vendejo multe disvolvis la tradicion ĉinan akvokoloran ksilografion. La de ĝi reproduktita fama pentraĵo "Nokta Festeno de Han Ŝjizaj" estas versimila, en plena stilo de la originalo. Nun la akvoko-

loraj ksilografiaĵoj faritaj de Ĵongbaŭĝaj jam superis 1 500 specojn, inkl. de multaj famaj pentraĵoj en la lastaj 1 000 jaroj.

Unu el la ĉiutagaj laboroj de Ĵongbaŭĝaj estas kolekti, montri kaj vendi pentraĵojn, kaligrafiaĵojn kaj bronzaĵojn kaj ŝtonajn grifelaĵojn. Tra diversaj kanaloj la vendejo kolektas famajn verkojn antikvajn kaj modernajn kaj montras ilin en diversaj salonoj, por ke la klientoj elektu kaj aĉetu.

La vendejo laŭeble konservas la tradicion stilon de la vendataj papero, ĉinaj inkpecoj, penikoj, ŝtonplataj inkujoj kaj aliaj. Ĝiaj varoj plejparte estas faritaj de famaj produktistoj kaj fabrikoj. Cetere ĝi mem produktas kaj prilaboras iujn apartajn specojn de papero kaj farboj por kontentigi la bezonon de iuj klientoj.

Per kio allogas la Ĉiela Altaro?

La Ĉiela Altaro estis loko, kie ĉinaj feŭdaj imperiestroj kultis la ĉielon. Ĝiaj dispozicio kaj ĉefa konstrua strukturo kun originala stilo portas grandan mirindecon.

La ĉirkaŭmurigita Ĉiela Altaro havas formon kvadratan en la suda parto kaj duonrondan en la norda parto. Rondo simbolas la ĉielon, dum kvadrato la teron.

La grandioza Preĝejo de Riĉa Rikolto kun tri-etaĝaj tegmentrandoj estas ronda, staranta sur ronda, tritavola blankmarmora bazamento. Ĝi havas altecon de 38 metroj kaj diametron de 30 metroj. Ĝi estas de tipa ligna krucostrukturo propra al Ĉinio. Ĝian tegmenton subtenas 28 grandaj kolonoj, el kies 4 centraj kolonoj ĉiu estas brakumbla preskaŭ por tri homoj. Tiuj kvar reprezentas la kvar sezonojn; la mezaj 12 — la 12 monatojn; la eksteraj 12 — la 12 temperojn (ĉiu tempero egalas 2 horojn; la mezaj kaj eksteraj 24 kolonoj — la 24 sunperiodojn laŭ la ĉina luna kalendaro; la 28 kolonoj de la templo — 28 konstelaciojn; kaj la 36 kolonetoj

— 36 brilajn stelojn.

La Templo de la Firmamento estas ronda. Antaŭe oni konservis tie nomtabuleton de dio. La templo estas ĉirkaŭita de alta ronda muro, kiu povas transsendi sonon. Se iu flustras ĉe iu loko kun kapo premita al la muro, alia povas aŭdi lian voĉon en alia loko kvazaŭ en telefonado, tial oni nomas la muron sontranssenda muro. Multaj turistoj ŝatas tie "telefonon". Ekster la Templo de la Firmamento estas la Tri Eĥo-ŝtonoj. Oni povas aŭdi unu eĥon, se oni krias starante sur la unua ŝtonplato, kaj du kaj tri eĥojn sur la dua kaj tria ŝtonplatoj. Tiu fenomeno estiĝas pro la malsameco de la distancoj trapasitaj de la eĥoj resenditaj de la ronda muro.

La Ronda Altaro estas tri-etaĝa kaj ĉiu etaĝo estas ĉirkaŭita de blankmarmora balustrado. Se oni mallaŭte parolas starante ĉe ĝia centro, oni povas aŭdi fortan eĥon. La kaŭzo estas, ke ĉe la centra punkto koncentriĝas la eĥoj resenditaj de la ĉirkaŭaj balustradoj kaj muroj.

Ĉiovendejoj en Pekino

La Pekina Magazeno, Dongfeng-magazeno, Ŝjidan-magazeno kaj la Dongsi-a Popola Magazeno estas kvar grandaj ĉiovendejoj de Pekino.

La Pekina Magazeno, ĉe la movoplena strato Ŭangfuĝing, estas la unua granda ĉiovendejo konstruita en Pekino post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Ĝi vendas komercaĵojn de pli ol 26 000 specoj fabrikitaĵoj de Pekino kaj aliaj lokoj de la lando, kiel ĉiutagaj necesaj, skribiloj, vestoj, ŝuoj, ĉapoj, manĝaĵoj kaj medikamentoj.

Dongfeng-magazeno havas sian lokon en granda hela halo, bazita sur pli ol 900 reformitaj privataj vendotabloj kaj butikoj. Krom ĉiutagaj necesaj kaj metiartaĵoj, ĝi vendas ankaŭ diversajn manĝaĵojn kun loka gusto. Tie funkcias ankaŭ Donglajŝun-restoracio, kiu servas per broĝita ŝaĵo kun pekina gusto.

Ŝjidan-magazeno estas ĉiovendejo kun relative perfektaj ekipaĵoj. Ĝi vendas varojn de pli ol 20 000 specoj, kiaj ĉiutagaj necesaj, drapo, silko, pelt, lana ŝtofo, vestoj, metiartaĵoj kaj memoraĵoj.

La Dongsi-a Popola Magazeno estis bazaro konsistanta el teatroj, restoracioj kaj vendobudoj. Poste oni konstruis ĝin. Pasintjare oni komencis pligrandigi ĝin denove. Pro la konstruado la magazeno havas malgrandan spacon por servo.

Krome, en Pekino estas ankaŭ la vendejo "Amikeco" servanta ekskluzive al eksterlandanoj. Ĝi estas tri-etaĝa kaj vendas komercaĵojn de proksimume 50 000 specoj. En la unua etaĝo vendiĝas manĝaĵoj, en la dua ĉiutagaj necesaj kaj en la tria tradiciaj ĉinaj metiartaĵoj.


Menaĝerio en Pekino

La Pekina Zoologia Ĝardeno situas okcidente de Ŝjigimen, neralproksime de la Pekina Scienca Halo, nia kongresejo. Ĝi estis privata ĝardeno de imperiestra familio en la feŭda socio de Ĉinio. Nun tie staras multaj bestdomoj en malsamaj stiloj kaj formoj. Tie brediĝas multaj kuriozaj bestoj.

La domo de pandoj estas ombrata de verdaj bambuoj. Tie vivas paroj da grandaj pandoj. Ili, korpulentaj, inertaj, naivaj kaj mildaj, estas dreseblaj kaj povas imiti homajn gestojn. Pro tio ili tre allogas la rigardantojn.

En la zoo vivas kuriozaj orharaj simioj propraj al Ĉinio. Ili, tutkorpe kovritaj de longaj, brilaj kaj densaj oraj haroj, senĉese grimpas, saltas, petolas en giganta kaĝo kaj per tio gajigas la atmosferon.

En la zoo vidiĝas ankaŭ gibonoj, blankkapaj folisimioj, ruĝvertaj gruoj, nordorientaj tigroj kaj aligatoroj propraj al Ĉinio, kaj virleono, la reĝo de la bestoj, kaj ĝirafoj, la plej altaj el la bestoj. Krome, tie vivas ankaŭ amerikaj agloj, aŭstraliaj kangurooj, afrikaj hipopotamoj kaj rinoceroj, antarktaj pingvenoj kaj polusaj ursoj.



AL LA NOVA ETAPO

KONGRESA KURIERO DE LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO EN PEKINO 1986

Sub la aŭspicio de El Popola Ĉinio

Kvina numero 31-07-1986

Kongresanoj Akceptitaj en la Popola Halo

La 28an de julio s-ro Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato akceptis parton de la kongresanoj en la ĉina parlamentejo Popola Halo, kaj ilin regalis per luksa bankedo, signe de alta takso de la ĉina registaro al nia Kongreso kaj simpatio al Esperanto. En sia parolado li denove laŭdis la trafecon de la kongresa temo "Interkompreniĝo, paco, evoluo".

En la bankedo parolis ankaŭ la prezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens kaj la nove elektita prezidanto de UEA s-ro Humphrey Tonkin. Ambaŭ ili alte aprecis la subtenon kaj bonan kunlaboron de la ĉina registaro kaj tostis la vivuon al Ĉinio kaj Esperanto.

La Popola Halo estas loko, kie oni okazigas plej gravajn kunvenojn kaj akceptas plej honorajn gastojn de la ŝtato. Ni ĝojas, ke ankaŭ ni esperantistoj havis la honoron esti tie gastigitaj.

Raporto pri Kunveno de VEK

okazinta 27.07 1986 en la salono Hujucz

VEK (Veterana Esperantista Klubo) komencis la vicojn de la fakaj kunvenoj. Tamen la sekretariino malfruiĝis. Pro helpo de samideanoj Ivan Ko, Pekino kaj Hans Schütt, Hamburg, komenciĝis la kunveno ĝustatempe. Ni pritraktis la kongresan temon per parolado pri la pasinteco fare de s-ro Chen Shide

(Zensto), Pekino; pri la nuntempa situacio en Ĉinio parolis prof. Sha Di; kaj la sekretariino de VEK klarigis la situacion kaj estratecon de internacia VEK. Ĉeestis pli ol 60 gesamideanoj el 10 landoj. Je la 17:00 ni finiĝis per komuna fotado.

Julie Winter
sekr. de VEK

La Medicinistoj Aktivas

Dum sia 25-a jarkunveno la 28 de julio ĉ.j. la ĉeestantaj kongresanoj sanlaboristoj el 9 landoj pridiskutis la fakan enlandan medicinan agadon por kaj per Esperanto, turnis specialan atenton al la financa stato de UMEA kaj proponis rimedojn por plua apero de la "Medicina Internacia Revuo" kiel altnivela scienca eldonaĵo.

Sinjoro Opoka prezentis la organizadon kaj apelaciis la partoprenon la VI-an Internacian Medicinan Eokonferencon en Krakovo, 1987. Doc. St. Krajewsky, membro de la pola delegitaro, nome de la rektoro de la Krakowa Medicina Akademio enmanigis al ĉinaj medicinistoj honoran medalon kaj diplomon.

Fervojista Kontaktkunveno

Lunde la 28-an de julio je la 10-a komenciĝis en la salono "Verda Majo" la kunveno de fervojistoj. El

15 landoj partoprenis 51 personoj. Prezidis s-ro Lucien de Sutter el Belgio, s-ro István Gulyás, komitatano

A de IFEF ĉe UEA el Hungario.

István Gulyás raportis pri la organizo kaj evoluo de IFEF, kaj li detale konigis la ĉi-jaran IFEF-kongreson kiu estis en Skopje (Jugoslavio). Li laŭlegis la leteron de prezidanto de IFEF sinjoro Joachim Giessner en kiu li esprimis siajn bondezirojn kaj proponis la aliĝon de la ĉinaj fervojistoj. La unua fakprelego de István Gulyás temis pri la estonto de la eŭropaj fervojoj, la dua de Jozef Weidacher el FR Germanio temis pri la sensacia novaĵo de la Germana Federacia Fer-

vojo. Li prezentis la plej modernan trajnon de la DB.

En la alparoloj la ĉina delegito sinjoro Li Shen salutis la kunvenon kaj al ĉiuj partoprenantoj donacis ĉinan fervojistan insignon.

Fine agrabligis la atmosferon de la kunveno la pocmo de d-ro Ferenc Jáki el Hungario, kiu deklamis sian propran aktualan poemon pri la paco.

István Gulyás, komitatano A
de IFEF ĉe UEA, el Hungario

Cent ĉeestis diservon

La diservo en Chongwenmen-preĝejo okazis kiel planite dimanĉe. Ĉirkaŭ cent kongresanoj kaj aliaj esperantistoj ĉeestis. Predikis Zhao Zhilian pri "Kristo kaj la paco". Gvidis la diservon Leif Nordens storm. Oni ankaŭ kantis plurajn himnojn kaj kolektis monon por la loka preĝejo.

horo 16:00 en Salono Venlo Fon, bonvenigas ĉiujn interesulojn.

Filozofia Asocio Tutmonda: 4-a Simpozio

Temo: Filozofio pri edukado

- 1 Salutvortoj de P-ro Pauli
- 2 C. Nourmont: Filozofio de la edukado
- 3 Ragnar Baldursson: La tradicia rolo de filozofio kaj edukado en la ĉina socio

Ĵaŭde la 31an de julio, de 10:00 ĝis 11:30.

Ĉiuj interesiĝantoj estas bonvenaj!

Kristanoj de I.K.U.E.

Bonvenigas

Kristanoj de la Internacia Katolika Unuiĝo-Esperantisto (IKUE), kiu kunvenos la 31-an, 7, 86 je la

Adresaro

2139	iseo-l	Herraiz del Hoyo S-ro Eliseo Bruc 53 08240 Manresa Hispanujo
2140	izon-h	Lago Izon Aurca Urzaiz 84, 2' B 36204 Vigo Hispanujo
2141	niel-u	Sampedro Pérez Daniel Virgen de Begoña 17, 1' 48970 Basauri Hispanujo
2142	reir-e	Pereira Lamela Concepción Urzaiz 84, 2' B 36204 Vigo Hispanujo
2143	sanu-f	Carreras Sanjurjo Sara Rambla Cataluña, 60-62 08007 Barcelona Hispanujo
2144	bcev-m	Bacev S-ro Marin P.K. 1054 1000 Sofia Bulgarujo
2145	andg-i	Gaillard S-ro André C.J. 48 rue de la Glacière, esc. 3 75015 Paris Francujo
2146	sath-u	Sato S-ro Hiroyuki Miyuki-so 207 4-12-12 Oyodonata-machi 531 Oyodo-ku, Osaka-shi Japanujo
2147	ersb-f	Erös S-ro Balázs pf. 9 5006 Szolnok Hungarujo
2148	krat-b	Kratt S-ro Karl F. Zinsergasse 14 733 VS-Villingen FR Germanujo
2149	gsll-c	Gasalla S-ro J. Hispanujo
2150	trad-l	Radić S-ro Tomislav Račkoga 10 41000 Zagreb Jugoslavio
2151	todo-f	Tojoda S-ro Hidemaru p/a Oomoto 621 Kameoka-si, Kyôtô-hu Japanujo
2152	ruza-z	Tisljar S-ino Ruza Badelova 24 41410 Velika Gorica Jugoslavio

EPĈ-INFORMILO

KVINA NUMERO

Por eldoni pli da Esperantaj libroj

En la pasinteco la redakcio de «El Popola Ĉinio» eldonis, krom sia revuo, ankaŭ Esperantajn librojn kunlaboro kun la Ĉina Esperanto-Ligo. De 1952 ĝis 1965 la ligo kaj la redakcio eldonis Esperantajn librojn de 96 specoj.

En 1966, puŝate de esperantistoj, la Fremdlingva Eldonejo de Pekino fondis la Esperantan Seĉkion, kiu dum dekelkaj jaroj eldonis Esperantajn librojn de 175 specoj. En 1979 la Esperanta Seĉkio aliĝis al la redakcio de «El Popola Ĉinio», kaj la lasta eldonis denove Esperantajn librojn.

En la fino de 1981 fondiĝis la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi eldonis ĉ. 60 000 Esperantajn librojn de 8-9 specoj ĉiujare. De 1984 rimarkinde multiĝis la librospecoj kaj la eldonkvanto.

Nun la eldonejo eldonas Esperantajn librojn de pli ol 20 specoj, kun 2-3 milionoj da ideogramoj.

La Ĉina Esperanto-Eldonejo estas unika en Ĉinio por eldoni originalajn Esperantajn verkojn kaj tradukojn. Inter ili estas famaj literaturaj verkoj, popolarakontoj, mikronoveloj, la Feniksa Libraro pri Ĉinio, scienc-popularaj legaĵoj, infanlibroj, albumoj, poŝtkartoj, Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj. Tiuj eldonaĵoj distribuiĝas en dekoj da landoj kaj regionoj kaj estas bonvenaj al esperantistoj en- kaj eksterlandaj.

La Ĉina Esperanto-Eldonejo kontribuas al Esperanto-movado per faka kunlaboro kun eksterlandaj Esperantaj organizoj kaj eldonejoj.

Pekina Esperanto-Asocio

La Pekina Esperanto-Asocio estas aktiva loka Esperanta organizo de Ĉinio. Ĝi fondiĝis la 25-an de januaro 1981, kun 400 membroj. La fama ĉina tradukisto Ge Baŭĉjŭan funkcias kiel ĝia prezidanto kaj Zen Hojaŭ, LKK-ano de la 71-a UK, kiel ĝia ĝenerala sekretario. Vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso Ĉu Tunan kaj vicurbestro de Pekino Ĉen Haŭsu estas ĝiaj honoraj prezidantoj. Kaj 23 eminentuloj (veteranaj esperantistoj) estas ĝiaj honoraj konsilantoj.

La celo de la asocio estas studi, propagandi kaj disvastigi Esperanton, kul-

turi Esperantajn talentulojn kaj servi por la moderna konstruado de Ĉinio kaj la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj. La asocio havas edukkan komisionon, akademian komisionon, Esperanto-horon kaj teatran grupon. Dum la pasintaj kvin jaroj ĝi funkciigis elementajn, progresigajn kaj parolajn Esperanto-kursojn kaj akceptis pli ol 300 eksterlandajn gesamideanojn.

La delegitoj de la asocio al la 71-a UK estas ankaŭ ties volontuloj. Ili deziras, ke la diverslandaj samideanoj pasigu la agrablajn tagojn en la kongresurbo.

Ĉiutaga Esperanta elsendo de Radio Pekino

Esperanto estas unu el la 42 lingvoj, kiujn Radio Pekino uzas por elsendo. Komence Radio Pekino elsendis Esperantajn programerojn dufoje ĉiusemajne por duonhoru (inkl. ripeton en unu fojo). Kaj nun ĝi elsendas duonhoron ĉiutage (inkl. tritagan ripeton). Krom la programero «Ĉina Kulturo», estas ankaŭ aliaj programeroj: «Muzika Programero», «Literaturo», «Esperanto en Marŝo», «Vojaĝo en Ĉinio» kaj «Leterkesto».

El la leteroj de aŭskultantoj la laborantoj de Radio Pekino informiĝas, kiuj programeroj plaĉas al ili kaj kiuj ne. Kaj «Leterkesto» povas akcepti proponojn kaj kontentigi petojn de la aŭskultantoj.

Radio Pekino trovas siajn aŭskultantojn de pli ol 50 landoj kaj regionoj de Eŭropo, Azio kaj Latin-Ameriko.

Pekino loĝata de multaj naciecoj

Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio, estas civilizita urbo kun historio de 3 000 jaroj kaj kun plej multaj nacimalplimulto. Ĉiu el la 56 ĉinaj naciecoj havas siajn membrojn en Pekino. Pekino havas 9 250 000 loĝantojn, kies plejparton konsistigas la hanoj kaj el kiuj estas pli ol 322 000 nacimalplimultanoj.

Inter la pekinaj nacimalplimulto la huoj, manĉuroj kaj mongoloj estas pli multaj kaj fiksluĝas delonge. Ĉe Bovo-strato en Ŝjŭan'u-distrikto dense

loĝas huoj. Tie estas butikoj vendantaj speciale bovaĵon, ŝafajon kaj manĝaĵojn por huoj kaj funkcias restoracioj por ili. Por altiĝi la klorecon de huoj, oni fondis element-kaj mezlernejojn. La moskeo sur Bovo-strato estas islama preĝejo kun longa historio. En la tagoj de diservo kaj en la islamaj festoj la proksimaj huoj kaj islamanoj de aliaj urbopartoj venas al la moskeo por preĝi. Oni povas diri, ke Bovo-strato servas kiel fenestro por observi la vivon de la nacimalplimulto loĝantaj en Pekino.

Pekinaj stratetoj kaj kvadrataj kortoj ĉirkaŭitaj de domoj

Pririgardo al pekin-stilaj stratetoj kaj kvadrataj kortoj ĉirkaŭitaj de domoj en la stratetoj kredeble profundigos vian impreson pri Pekino.

Plejparto de la stratetoj de Pekino estas simetrie lokita en bona ordo. La nomoj de la stratetoj estas tre interesaj. Ekzemple iuj stratetoj portas la nomojn «Aroma Logaĵo», «Ŝtona Birdo» k.s. En Pekino estas multaj stratetoj portantaj la nomon koncernantan ŝafon, ekzemple la stratetoj «Safa Lano», «Safa Vosto», «Safa Intesto» k.s. Tia nomado estis influita de produktaĵoj kaj profesioj de Pekino en la historio. Ĝi montras la prosperon de la rilataj okupoj.

En la historio Pekino servis kiel ĉefurbo de pluraj dinastioj, kaj ĝiaj multaj stratetoj entenis gravajn oficejojn de la kortego, tial iuj stratetoj ricevis la nomojn Tajpusi (oficejo de ia altrangulo), Municia Buroo, Militafera Buroo k.s.

Iuj stratetoj portas la nomojn de temploj, ekzemple la stratetoj Bajji'an, Laŭĝjuntang kaj Ĝuanjinsi. Iuj temploj nun ankoraŭ ekzistas en Pekino,

ekzemple la Blankpagoda Templo kaj la Cipresara Templo. La nomoj de iuj stratetoj markis la rangon de la loĝantoj, ekzemple la stratetoj Duko Ŝja kaj Princo Gong. Aŭdinte la nomon, oni tuj komprenas, ke tie vivis parencoj de imperiestroj.

Kvadrataj kortoj ĉirkaŭitaj de domoj estas karakterizaĵo de Pekino. Tiaspecaj domoj estas pli multaj ol la alispecaj. Ili aperis en Ĵŭan-dinastio antaŭ pli ol 700 jaroj. La nun ekzistantaj estis konstruitaj en Ĉing-dinastio (1644-1911) aŭ pli poste.

Tiaj domoj estas unu-etaĝaj, loĝataj de pluraj familioj. La pordo de la korto lokiĝas en ĝia sudorienta, nordokcidenta aŭ nordorienta angulo. Malantaŭ la pordo staras ekranmuro, kiu baras la rektan rigardon internen de la korto. La ekranmuro surhavas sur la dorso ŝtonan aŭ brikan gravuraĵon kaj ĉizitan poemon aŭ versparon. Ĉe aliaj tiaj domoj estas antaŭa kaj interna kortoj kun pordoj.

La arkitekturo de tiaj domoj havas fortan pekinan guston.



Drako

Drako en la antikva ĉina legendo estis humana besto propra al Ĉinio. Jam en la primitiva socio ĝi estis priskribita kiel besto kun homa kapo kaj serpenta korpo kaj kultita kiel klana aŭ triba totemo.

Iu verko skribita en 1100 p.K. rakontas, ke drako havas cervajn kornojn, kamelan kapon, salikokajn okulojn, serpentan kolon, tridaknan ventron, karpajn skvamojn, aglajn ungojn, tigrajn piedojn kaj bovajn orelojn. Poste, la drakoj el la palaco aŭ popola arto ĝenerale havis la suprajn karakterizaĵojn. Laŭlegende, drako povas movi nubojn kaj estigi pluvon. Tial en multaj lokoj de Ĉinio estis temploj de drakoreĝo. Dum trosekeco oni preĝis en la temploj, ke la

drako-reĝo donu pluvon al la homa mondo. Tiam drako estis simbolo de supernatura estaĵo. Kaj pli poste, ĝi fariĝis prapatro de la plej altaj regantoj kaj simbolis la absolutan aŭtoritaton de feŭda imperiestro. La imperiestro pretendis, ke li estas filo de la drako. Ĉiuj liaj vivbezonaĵoj portis la nomon drako kaj estis ornamitaj per diversaj drakofiguroj.

Nun ĉie en Ĉinio videblas drakaj ornamaĵoj kaj cirkulas legendoj pri drakoj. En multaj lokoj okazas aktivadoj kun rilataj moroj, ekz. drakboata konkurso kaj ludo de draka lanterno kaj draka danco. Tial oni nomas Ĉinion hejmloko de la drako kaj la posteulojn de la ĉina nacio idaro de la drako.

Pekinaj etmanĝaĵoj

Pekinaj etmanĝaĵoj estas tradiciaj, kun aparta gusto. El ili pli ol 300 specoj estas famaj kaj malkaraj. Ekzemple, troviĝas pli ol dek specoj de bakitaj kukoj, inkluzive la rompiĝemajn kaj sezampastajn. El la vian-daj manĝaĵoj estas brogitaj ŝafaj aŭ bovaj stomak-strioj kun spicaĵoj, salamo kaj porka internaĵo. La etmanĝaĵojn oni faras el tritika faruno, rizo, milio, viando, ovo, lakto, frukto, legomo kaj batato. La metodoj por preparado estas tre diversaj, kiaj va-

porumado, fritado, kuirado, bakado, rostado, patfritado, etfajra kaj fort-fajra kuirado, brezado kaj bolkuirado. Tiel oni povas prepari diversajn etmanĝaĵojn gluecajn, fragilajn, aromajn, dolĉajn, salajn, malvarmajn, varmajn, sekajn kaj fluidajn, kiuj estas malsamgustaj kaj apetitivekaj.

En malsamaj sezonoj pekinanoj prenas malsamajn etmanĝaĵojn. Al ili plaĉas gluecaj etmanĝaĵoj en printempo kaj aŭtuno, malvarmaj en somero kaj varmaj en vintro.



AL LA NOVA ETAPO

KONGRESA KURIERO DE LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO EN PEKINO 1986

Sub la aŭspicio de El Popola Ĉinio

Sesa numero 1-08-1986

Nove elektita estraro de UEA

Humphrey Tonkin (prezidanto el Usono)
Yosimi Umeda (vicprezidanto el Japanujo)
Flóra Szabó-Felső (ĝenerala sekretario el Hungarujo)
Grégoire Maertens (eksteraj rilatoj el Belgio)
Jean-Louis Texier (interna agado el Francio)
Victor Sadler (Financo el Nederlando)
Barbara Despiney (el Francio)
Diccon Masterman (el Britio)
(La komitato eventuale elektos unu plian personon en sia vendreda kunsido.)

Jurnalismo en la 71a Kongreso

Ĝis la 31-a de julio 102 ĵurnalistoj el 48 novaĝ-agentoj kaj redakcioj, inkluzive de 3 raportistoj el ne-ĉinaj agentejoj kaj televida studio, ĉeestis nian Kongreson kaj raportis pri Esperanto kaj nia Kongreso per 47 artikoloj kaj videobendoj. Interalie influhavaj "Renmin Ribao" (Popola Ĵurnalo), "China Daily", "Guangming Ribao" (Ĵurnalo de Lumo), "Jiefangjun Bao" (Ĵurnalo de Liberiga Armeo), "Jingji Ribao" (Ekonomia Ĵurnalo) raportis pri la inaŭguro tuj en la sekva tago.

Ora kaj Arĝenta Medaloj por la Jubileo

Honore al la Centjara Jubileo, kaj en la kadro de tiurilata programo de Jugoslavio E-Ligo, ties regiona organizaĵo Serbia E-Ligo eldonis du specojn de medaloj. Unu estas el oro, alia el arĝento. Iliaj unuaj specimenoj estas transdonitaj dum la Solena Fermo, kaj ili poste estos mendeblaj ĉe UEA. La idea aŭtoro de la medalo estas d-ro Mika J. Andrić.

Belarta konkurso

La rezulto de la belarta konkurso publikigis en kunveno en jaŭdo: PACO (speciala branĉo en 1986): La sola premio al Stefan MacGill por "Reveno al paco". POEZIO: Unua premio al Albert Goodheir por "Adoro"; dua premio al Albert Goodheir por "Enlumiĝo"; tria premio al Karolina Gilmore por "La poeto". PROZO: Unua premio al K.T. Janovic por "Nokturno por blankulo"; dua premio al F. Ksavero Maleono por "Hura!"; tria premio egale al F. Ksavero Maleono por "Malantaŭ la pordo", Spomenka Štimec por "Pruntitaj vortoj" kaj Gunnar Gällmo por "Lingva demando". TEATRAĴO: Unua premio al Karolina Gilmore por "La verda tendo"; dua premio al Karolina Gilmore por "Filozofio kaj realo"; tria premio al J.M. Derzelle por "Se ĉiuj homaranoj...". ESEO: Unua premio al Albert Good-

heir por "Esperanto en nova framo". KANTO: Sola premio al Olena Kopicjanska por "Muziko". FOTO: Unua kaj duaj premioj ne aljuĝitaj; tria premio al Miyosi Tanaka por "Paco de Hiroŝima".

Amika Gesto al la Pekina UK

Helpe de la Komisiono de Eŭropa Komunumo bruselaj esperantistoj sukcesis aperigi en Esperanto filmon, kiu antaŭe estis nur en la lingvoj de EK. Tiel la E-versio de la filmo "Dum 20 jarcentoj..." estas amikeca gesto de eŭropanoj al azianoj kaj ĉiuj aliaj, kiuj parolas lingvon, kiu ne estas iu el la 9 oficialaj EK-lingvoj. La monda inaŭguro de la filmo okazos en la pekina UK, salono Zamenhof, hodiaŭ vendrede je la 14-a horo.

Ni substrekas, ke la filmo havas pedagogian celon: ĝi rakontas pri la komuna historio de eŭropanoj kaj pri la ekesto de EK. La filmo rekomendindas por E-grupoj, kursoj ktp. kaj ĝi estas senpage pruntebla ĉe Commission of the European Communities, Film-Library, M.J.P. Liefrig, B1/118, B-1049 Brussel/Bru-xelles. Pliaj informoj ĉe la prezentado kaj pere de kong. n-ro 2083 M. Cwik.

290 Legantoj de EPĈ Kunsidis

La 2-an posttagmeze de la 31-a okazis en Zamenhof-halo kunsido de legantoj "El Popola Ĉinio". 290 legantoj montris grandan afablecon per sia ĉeesto, kaj la manoj levitaj unu post alia atendis mikrofonon. Ilia laŭdo al la gazeto kompreneble inspiras la personaron de la redakcio, kaj iliaj pensiga kritiko kaj proponoj helpas la redaktoraron en senĉesa klopodo por plitaŭgeco de EPĈ.

Pli ol 200 geamikoj el 30 landoj en Radio Pekino

Posttagmeze de la 29-a, pli ol 200 geamikoj el 30 landoj ĝoje kunsidis en studio de Radio Pekino. Intertiom da invititoj multaj estas malnovaj aŭskultantoj de la Esperanta el-

sendo de Radio Pekino dum ĝia 22 jara ekzisto. En la kunsido ili kunĝojo kaj dankemo laŭdis la valoran laboron de Radio Pekino. Kelkaj proponas, ke ĝi elsendu sian programon ankaŭ al tiuj regionoj, kie ĝis hodiaŭ ne estas aŭdata la elsendo. Post la kunsido sekvis bankedo. Tostparolis vicministro de la Ĉina Ministerio de Radio, Filmo kaj Televido s-ro Ma Wenxiong, direktoro de Radio Pekino, s-ro Grégoire Maertens kaj d-ino Flóra Szabó-Felső.

Informo el IKU

IKU inaŭguriĝis la 27-an de julio. En ĝi prelegis dek famaj sciencistoj kaj profesoroj el 8 landoj en Azio, Eŭropo kaj Ameriko. Inter ili estis s-ro Chen Yuan (Ĉinio), s-ro Sin'itirō Kawamura, s-ro Io Chou (Ĉinio), s-ro Jannes Markus Mabesoone (Brazilo), s-ro E. Jamens Lieberman (Usono), s-ro Božidar Popović (Jugoslavio), s-ro Leszek Kordylewski (Pollando), f-ino Daniela Deneva (Bulgario), s-ro Li Shijun (Ĉinio) kaj s-ro Victor Sadler (Nederlando). Iliaj prelegoj altiris atenton de fakuloj. Post la prelegoj iris diskuto en varma etoso.

Programo de Internacia Arta Vespero/Packconcerto

Vendredon, la 1-an de aŭgusto, 1986 je 20:00 — 22:00 ĉe Ĉina Teatrejo

Unua Parto

- Ĉinaj gekantistoj prezentas siajn repertuarojn:
S-ino Bian Xiao Zhen
S-ro Ge Xiao Cheng
S-ino Qiu Zimin
- Usona knabino ludas violonon:
F-ino Sara Su Jones
- "Kanto de 1' Kosmo" de japana grupo Korcirkula Stacio:
S-ro Hukuzawa Moro
S-ro Kondo Yasusi

Paŭzo

Dua Parto

- Japana danco laŭ Hanayagi-skolo "Gosiki no Ito":
F-ino Hanayagi Izuho
- Ĉinaj kantoj laŭ variaj prezentoj:
S-ino Lin Fang
S-ro Zhang Jun (Pekina operisto)
Ducto de s-ino Fu Peidi kaj s-ro Piao Zhun Shan
- Balkan-kantoj sonu en la Oriento:
Bulgara Koruso "Patrolanda Kanto"

Finalo

Komuna kantado de "La Espero"

Nealiancaj kunvenos

Hodiaŭ, vendredon la 1-an de aŭgusto de 17:30 ĝis la 18:30 en la salono Carson (n-ro 211) kunvenos la esperantistoj el nealiancaj landoj por preparoli la komunajn problemojn kaj ĝisnunajn kaj estontan agadon. Ĉiuj interesitoj estas bonvenaj. La kunvenon prezidos Tibor Sekelj.

Atenton, Gekongresanoj!

Vi havas bonegan okazon pagi ankoraŭ en Pekino la kongres-kotizon por la 72a Universala Kongreso de Esperanto en 1987 en Varsovio. La ĝiceto de la varsovia kongreso funkcias en la salono Damjanov (vendrede la lastan fojon).

Kaptu la okazon kaj venu pagi en juanoj!

Stanislaw Swistak, prezidanto de LKK — Varsovio

Servema Fotoservo de UK

Favore al la kongresanoj la Fotoservo liveros videobendon pri kongresaj aktivadoj por duonhoro. Antaŭtagmeze de la 1-a de aŭgusto la videobendo estos mendebla ĉe la Fotoservo kaj prezentata kun ĉina nacia muziko kaj esperantaj klarigoj en la vestiblo de la kongresejo.

Sciencaj Komunikadoj

En la Kongresa Libroservo estas aĉeteblaj tre favorpreze la lastaj tri numeroj de la periodaĵo Sciencaj Komunikadoj (nur 2,60 juanoj por unu numero!). Cetere, estas planate aperigi tiun ĉi scienc-popularigan revuon regule ekde 1987. Pri abonebleco bonvolu skribi al: Sciencaj Komunikadoj, Esperanto-centro, Budapeŝto, Pf. 193. H-1368, Hungario.

Koran saluton!

Ĉar ĉi-jare mi ne povas partopreni la Kongreson, mi kore salutas pere de la kongresa kuriero ĉiujn gekonatojn, kun la espero, ke ni revidiĝos en la Jubilea UK en Varsovio! Multan sukceson al la 71a UK deziras

Sija van Wijngaarden
Kongresn-ro 2

Adresaro

Jenaj adresoj elfalis el la Kongresa Libro:
563 Oterma s-ino Liisi, Sirkkalank. 31, 20700 Turku, Finnlando
1021 Lehtinen s-ro Pekka, Haavikont. 12, 35800 Tampere, Finnlando
1323 Ĉu Siu Hung, D 12 FL, Kam Fung Bldg, 8 Cleverly St., Sheung Wan, Hong Kong
1798 Qiu Zimin f-ino p/a Ĉina Esperanto-Ligo P.O. Kesto 825, Beijing, Ĉinio
1799 Xia Bangxin s-ro Nanjinglu 102 Hankou Wuhan, Hubei, Ĉinio

Ponto de amikeco

La Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio distribuas ĉinajn Esperantajn eldonaĵojn al diverslandaj samideanoj, kiuj pro tio nomas ĝin ponto de amikeco.

La Esperanta Sekcio estas speciala distribuanto de Esperantaj libroj kaj gazetoj de Ĉinio. Ĝi fondiĝis en 1974. Antaŭe ĝi estis libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝi portas la taskon distribui al Esperantaj organizoj kaj esperantistoj de pli ol 60 landoj kaj

regionoj la gazeton "El Popola Ĉinio" kaj Esperantajn librojn, albumojn kaj poŝtkartojn.

La sekcio havas rilaton kun diverslandaj agentejoj, perantoj kaj legantoj. Ĝi varbas EPĈ-abonantojn de vintro ĝis la venonta printempo. Ĉiujare ĝi ricevas milojn da leteroj de legantoj. Senprokraste ĝi plenumas ilian abon-peton kaj sendas al ili fakturon. Plejofte ĝi respondas al ili per tajpitaj leteroj.

Per Esperanto por scienco

Iniciatite de 14 eminentaj sciencistoj, fondiĝis la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj la 15-an de junio 1984. S-ro Lu Ĝjaŝji, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, funkcias kiel ĝia honora prezidanto kaj la 14 sciencistoj kiel ĝiaj konsilantoj.

La celo de la asocio estas unuigi kiel eble plej multajn sciencistojn kaj teknikistojn, lerni, studi kaj disvastigi Esperanton kaj apliki ĝin en la scienca kaj teknika kampo por fari vastan akademian interŝanĝon kun diverslandaj sciencistoj kaj teknikistoj kaj bone servi al la moderna konstruado de Ĉinio kaj la progresema afero de la homaro.

Post sia fondiĝo la asocio funkciigis 11 Esperanto-kursojn. Post lernado de du-tri monatoj la kursanoj jam

povas paroli Esperanton, legi Esperantajn kaj traduki scienc-teknikajn materialojn de 26 fakoj.

Kun la asocio korespondas 67 provincaj, urbaj kaj guberniaj Esperantaj organizaĵoj de Ĉinio kaj ĉ. 100 personoj el 39 Esperantaj organizaĵoj de 29 landoj. La asocio eldonas la trimonatan revuon "Scienc-teknika Esperanto" en la ĉina lingvo kaj en Esperanto. De la 22-a ĝis la 24-a de julio okazis en Pekino la Internacia Simpozio pri Sciencoj kaj Teknikoj de 1986. Ĝin partoprenis pli ol 100 sciencistoj, teknikistoj kaj esperantistoj el Japanio, Usono, Francio, Hungario, FR Germanio, Bulgario, GDR, Kongolando, Togo, Tanzanio kaj Ĉinio. En la simpozio oni prezentis pli ol 90 disertaciojn en Esperanto. Estis la unua fojo por Ĉinio okazigi tian simpozion.

Pekina Veterana Esperantista Asocio

La nomita asocio havas 70 membrojn, kiuj superis la aĝon de 55 jaroj aŭ lernis nian lingvon antaŭ 30 jaroj. Kiel aktivuloj de nia movado, ili deziras kontribui al propagando kaj disvastigo de Esperanto. Rektoro de la Internacia Kongresa Universitato

s-ro Chun-Chan Yeh estas prezidanto de la asocio.

La asocio korespondas kun la Veterana Esperantista Klubo (VEK). La kongresanoj de ambaŭ organizaĵoj diskutis dum ĉi kongreso pri tio, per kio kontribuu maljunaj esperantistoj.

La plej...

— Pri la ĉinaj vidindaĵoj

1. La plej granda kaj plej sendifekta antikva konstruaĵo estas la Imperiestra Palaco en Pekino.
2. La plej granda antikva konstruaĵo por kulto estas la Ĉiela Altaro en Pekino.
3. La plej granda imperiestra maŭzoleo estas tiu de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio en Senŝji-provinco.
4. Antikva konstruaĵo plej alte super la marnivelo estas Potala-palaco en Lhasa en la Tibeta Aŭtonoma Regiono.
5. La plej granda budhisma halo estas la Mahavira Halo de Hŭa-

- jan-templo en la urbo Datong, Sanŝji-provinco.
6. La plej aĝa budhisma templo estas la templo Bajma konstruita en la jaro 68 en la urbo Lŭo-ĵang, Henan-provinco.
7. La plej granda taoisma templo estas la templo Ŝjŭanmjaŭ en Suĝoŭ, Ĝjangsu-provinco.
8. La plej longa ŝtonkaverna freskaro estas tiu en la Milbudha Kaverno en Dunhŭang, Gansu-provinco. Nun restas tie 492 kavernoj kun freskaro 25 kilometrojn longa.
9. La plej aĝa moskeo estas la tem-



Potala-palaco

- plo Hŭajŝeng en Kantono, Ĝuangdong-provinco.
10. La plej grandioza antikva teraŝtona konstruaĵo estas la Granda Muro.
 11. La plej antikva akvoutiliga konstruaĵo estas Duĝjangjan plenumita 250 jarojn a.K. en Ĝuanŝjan-gubernio, Siĉŭan-provinco.
 12. La plej perfekta kaj plej bela imperiestra ĝardeno estas la Somera Palaco en Pekino.
 13. La plej granda imperiestra ĝardeno estas la Someruma Montvilao en Ĉengde, Hebej-provinco.
 14. La plej aĝa ligna templo estas la templo Nanĉan en Utaj-montaro, Sanŝji-provinco.
 15. La plej supera antikva lernejo estas Ĝŭoziĝjan en Pekino.
 16. La plej antikva biblioteko estas Tjanĝige en Ningbo, Ĝeĝjang-provinco.
 17. La plej antikva pentro-instituto estas la pentro-instituto Hanlin fondita en 935 p. K. en Ĉengdu, Siĉŭan-provinco.
 18. Lamaisma templo kun plej multaj klasikaj verkoj kaj antikvaj objektoj estas Labuleng-templo en Ŝjahe-gubernio, Gansu-provinco.

Ĉinaj poŝtmarkoj

Pasis jam 108 jaroj, de kiam la unua ĉina poŝtmarkoserio "Drakoj" estis emisiita.

Nun Ĉinio emisias poŝtmarkojn ĉefe ordinarajn, memorigajn kaj specialajn. La filatelistoj plej ŝatas kolekti grandajn, bele projektitajn enhavriĉajn memorigajn specialajn poŝtmarkojn. Tiaj poŝtmarkoj kiel enciklopedieto prezentas gravajn eventojn en la ĉina historio, grandajn personojn, atingojn en la ekonomia konstruado, antikvajn artaĵojn kaj inventaĵojn, arkitekturon, sporton, muzikon, dancojn, teatraĵojn,

belarton, pejzaĝon, florojn, birdojn, fiŝojn kaj insektojn.

Ĉe la malsupra rando de la ĉinaj poŝtmarkoj estas presitaj numero kaj emisia jaro, ke oni povas scii, ĉu la poŝtmarko estas memoriga aŭ speciala, kian vicon ĝi havas en la serio, kiom da pecoj entenas la serio sen legi la katalogon. La numero ebligas al la filatelistoj, precipe al la alilandaj, kiuj ne scias la ĉinan lingvon, koni la emisian situacion de la ĉinaj poŝtmarkoj kaj tiel faciligas iliajn kolektadon kaj ordigadon.

La Ĉina Belarta Domo

La Ĉina Belarta Domo estis konstruita en 1959, kun tipa nacia konstruaro. Ĝi havas grandan mansardon. Ĝiaj tegmento kaj tegmentrandoj estas provizitaj per ore glazuritaj tegoloj. Ambaŭflanke de la mansardo estas longaj simetriaj verandoj kun kremkoloraj muroj. La tegmentrandoj kaj kapitejoj surhavas glazuritajn ornamaĵojn riĉkolorajn kaj modestajn.

La domo konsistas el 14 ekspoziciejoj en tri etaĝoj, kun ekspozici-areo de pli ol 6 000 kvadrataj metroj. Krome, estas ankaŭ laborejoj por pentristoj kaj salonoj por interŝanĝi artojn.

Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj tie multfoje okazis ekspozicioj de belartaj verkoj, fotografiaĵoj, poŝtmarkoj kaj metiartaĵoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

700-jara observatorio

La antikva observatorio en Pekino estis starigita en 1279 en Ĵŭan-dinastio. Tie montriĝas 8 astronomiaj instrumentoj de la antikva Ĉinio, ĉiu kelkajn tunojn peza kaj kelkajn metrojn alta. Inter ili troviĝas ĉiela globuso, oktanta, sekstanto, ekliptika ringmezurilo kaj horizontala ringmezurilo. Ili estas faritaj el latuno. Per

observaj tuboj kaj diversaj ringoj turneblaj kaj gradigitaj laŭ la eŭropa mezursistemo, oni determinis la situon de la steloj sur la ĉielo. Sur la subteniloj de la instrumentoj gravuriĝis ĉarmaj drakoj kaj nuboj, kio montras ke la objektoj havas ne nur sciencajn valoron, sed ankaŭ altan artan nivelon.